

1974 julio - aŭgusto
67-a jaro
n-ro 823-24 (7-8)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Vi trovos

ke ĉi tiu "feria" numero de la revuo ne estas ripoziga laŭ la enhavo, ĉar ĝi alportas kelkajn kontribuojn, kiuj meritas atentan pristudon. La enkonduko al la debata temo de la 59a UK havas incitan titolon kaj ĝi, espereble, provokos viglan polemikon ĝenerale pri la rolo de la gazetaro en la Esperanto-movado. Sur pluraj paĝoj de ĉi tiu numero, la prezidanto de UEA eksponas siajn sugestojn por agadprogramo de la Asocio en la sekvantaj tri jaroj. Po unu literatura kaj historia novaĵoj (la represo de la fama "Literatura Mondo" kaj la pretigo de "Biografio de Lanti") en ĉi tiu numero ricevis apartan atenton. Kiel kutime, niaj regulaj rubrikoj klopodis liveri al vi aron da interesaj novaĵoj aŭ manplenon da utilaj informoj. Ĉiukaze, — Bonan leg-apetiton!

Enhavo

- 121 Prepare al la debato en Hamburgo: Landaj revuoj en Esperanto — ĉu utilaj? (J.C. Wells)
- 122 Akcepto honore al la prezidanto de UEA: Tridek diplomatoj, Rezulto de la elektoj: Novaj komitatanoj B
- 123 Sugestoj pri agadprogramo de UEA por la sekvanta trijara periodo 1974 - 1977 (Ivo Lapenna)
- 126 Okaze de la represo de "Literatura Mondo": La heroa revuo (William Auld)
- 127 Japanoj en Pekino
- 128 Edukado per satelitoj: Ĉu ŝanco por Afriko? (sm)
- 129 La arto de Onisaburo, Sovetaj revuoj pri Esperanto: Por milionoj (Boris Kolker)
- 130 El la biografio de Eŭgeno Lanti: La flavaj gantoj de Ernest Drezen (Eduard Borsboom)
- 131 Kalendaro (Esperanto - aranĝoj de aŭgusto ĝis decembro 1974)
- 132 Recenzoj ("Manlibro pri transporto de fluidaĵoj", "Katolika terminaro", "15 Komedietoj", "Nikolaj Rytjkov — Elektitaj eroj", "G. Marin vizitas sian hejmon — la mondon"), Laste aperis ...
- 134 TEJO-paĝo: Perua renaskiĝo, JEB kaj JEN ekviglas, IJK sen vi?, Ideologia pozicio de TEJO — diskutota, Ĉu vi parolas tendare?
- 135 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 59a UK en Hamburgo
- 136 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 138 Oficiala informilo, Laŭlanda membrostatistiko por 1973
- 139 Esperanto en radio (kompleta tabelo)
- 140 Nekrologoj (F. Fresco, R. van Eynde, B. Noveljić, J. Stefančić), Anoncetoj

La kovrilo

La kvar dandaj junuloj de plenbuŝa rido, fotitaj sur idilia paŝtejo, ie apud Trenĉin (Ĉeĥoslovakio), estas la membroj de la ĉiam pli kaj pli populara muzikensemblo KUARTETO ESPERANTO. La foto ja temas nur pri momenta ripozo inter streĉaj provludoj de nova programo per kiu la ensemblo regalos la partoprenontojn de la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo. La programo de KUARTETO ESPERANTO estos tamen nur unu ero en la abundo de kulturaj kaj artaj aranĝoj dum la Kongreso.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: S. Milojević.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendaro jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, FR Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, FR Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

Landaj revuoj en Esperanto – ĉu utilaj ?

EN ĈIU LANDO kun relative forta Esperanto-movado aperas periodaĵo aŭ periodaĵoj en la Internacia Lingvo. La plimulto el tiuj periodaĵoj estas organoj de la landaj Esperanto-asocioj; kelkaj estas sendependaj. Ili estas legataj plejparte de esperantistoj loĝantaj en la koncerna lando mem; ofte la landa asocio zorgas sendi ekzemplerojn ankaŭ al ĉiuj membroj de la Komitato de UEA, aŭ almenaŭ al la Estraranoj kaj al la Centra Oficejo; kelkaj estas abonataj kaj legataj certa-grade ankaŭ en aliaj landoj. La Esperantaj bibliotekoj diligente konservas jarkolektojn da ili; la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien ilin arĥivas; la lokaj grupoj ekspozicias ilin kaj disponigas ilin al siaj membroj. Amaso da fortostreĉoj, da laborhoroj, da sindona diligentado estas dediĉata al la verkado, redaktado, produktado, ekspedado kaj legado de tiuj periodaĵoj. Ili estas la landaj Esperanto-revuoj. Kion ili celas, kaj kiom ili atingas? Ĉu entute ili estas utilaj? Kiel oni povus ilin publikigi? Jen la temo de la Debato okazonta en la kadro de la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo.

Klopodante klarigi la rolon de la landaj revuoj, oni povas utile dividi iliajn funkciojn en tri ĉefajn partojn: la administra, la informa-varba kaj la literatura. La **administra** funkcio konsistas el raportoj, artikoloj, alvokoj, admonoj kaj anoncoj rilatantaj al la interna organizado de la landa Esperanto-asocio. Tie aperas la jarraporto de la landa asocio kaj – malpli grave – detaloj pri novaj membroj, aliĝintoj al kongresoj ktp. La asocio organizas nacian kongreson? – detalojn serĉu en la landa revuo. Ĝi aranĝas semajnfinan renkontiĝon aŭ novan kurson? – same. Kaj tie la prezidanto de la landa asocio povas paroli al la membroj, se ne menciis pri la sekretario, la kasisto kaj la estrarano komisiita pri la Informa Fakto. Ankaŭ la membroj povas aŭdi sian voĉon: kaj tia duflanka interkomunikigo estas esenca por la demokratia vivado de ĉiu organizaĵo.

La **informa-varba** funkcio rilatas al informado pri la Internacia Lingvo. La ekstera informado kompreneble okazas per la naciaj lingvoj: ĉiu landa asocio, kaj tute ĝenerale ĉiu Esperanto-organizaĵo, havas la taskon daŭre informi la publikon pri la monda lingvo-problemo kaj pri la solvo, kiun proponas Esperanto. La ĝusta loko por la aperigo de tiaj artikoloj, intervjuoj, k.s. estas la nacilingvaj amaskomunikiloj (gazetaro, radio,

televido); kial do – oni eble demandas – aperigi ilin en landa Esperanto-revuo? Unue, en multaj landoj la landa Esperanto-revuo estas ricevata ne nur de apogantoj de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ de publikaj bibliotekoj kaj de neesperantistaj organizaĵoj, kaj foje cetere sendata al parlamentanoj aŭ aliaj ŝlosilaj personoj. Due, oni devas ne forgesi la internan informadon: necesas regule liveri al tiuj, kiuj jam scias la lingvon aŭ almenaŭ subtenas la Movadon, ĝisdatajn kaj konvinkajn argumentojn favorajn al Esperanto. Necesas reagi al aktualaj evoluoj, kaj raporti la sukcesojn atingitajn de la Movado. Tiel oni stimulas kaj kuraĝigas la adeptojn, tiel oni persvadas partopreni en la Movado, tiujn, kiuj komencis lerni la lingvon, tiel oni fortikigas kaj entuziasmigas la tutan membraron.

Ankaŭ la **literatura** funkcio estas plurflanka. Ĝia plej elementa flanko estas pedagogia: provizi al la Esperanto-lernanto kaj progresanto interesan legomaterialon en taŭga formo. Sed ĝi havas ankaŭ kulture gravan flankon, la beletran: aperigi prozaĵojn kaj versaĵojn de bona lingva kaj stilistika nivelo, tiel ne nur liverante konvenan legomaterialon al tiuj, kiuj bone posedas la lingvon, sed ankaŭ kuraĝigante Esperanto-verkistojn kaj inspirante novajn aŭtorojn ekverki. Uzante lingvon, oni tenas ĝin viva; publikigante bonajn verkojn, oni flegas la kulturan esencon sen kiu Esperanto estus preskaŭ nur kodo.

La kerna demando estas jena: ĉu tiuj funkcioj ne povus esti pli bone plenumataj per alispecaj periodaĵoj ol la landaj revuoj? La administran rolon tute bone plenumas ia senpretenda bulteno. La informa-varba rolo apartenas propre al aparta nacilingva bulteno de la landa Informa Fakto, kiel antaŭvidite en la Dua Baza Laborplano de UEA.

Kaj la literatura flanko, estante ne speciale ligita al la lando, principe estus pli bone plenumata de internacia aŭ almenaŭ plurnacia revuo: *Norda Prismo*, *Literatura Foiro* k.c. Estas en iu senco absurde, ke internaciema movado dediĉita al la forigo de la lingvaj baroj inter la nacioj havas gazetaron plejparte organizitan ĝuste en naciaj kadroj.

Aliflanke – oni povas argumenti – la Esperanto-movado vivas en mondo organizita en naciaj kadroj. La ĝenerala kultura, socia, politika kaj ekonomia vivo okazas sur nacia aŭ ŝtata bazo. Tial ni bezonas landajn asociojn; kaj tial ni bezonas landajn Esperanto-revuojn.

J.C. Wells

Tridek diplomatoj

LIA EKSCLENCO la ambasadoro de Aŭstralio en Bonn, s-ro Ralph Harry, prezentis akcepton honore al la prezidanto de UEA en sia rezidejo en Bad Godesberg. La akcepto, aranĝita en ligo kun la baldaŭa Universala Kongreso en Hamburgo, okazis la 6an de junio en la malfrua posttagmezo. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de la LKK, d-ro W. Bormann, s-ino E. Bormann kaj s-ro U. Lins. Pli ol 30 ambasadoj akceptis la inviton kaj estis reprezentitaj aŭ de la ambasadoroj persone aŭ de ambasadaĵ konsilistoj, unuaj sekretarioj aŭ kulturaj ataŝeoj.

Unue ambasadoro R. Harry prezentis en la angla lingvo la prezidanton de UEA kaj donis kelkajn informojn pri la lingva problemo en diplomatio. S-ro U.

Lins tradukis en la germanan. Poste prof. Lapenna eksplikis en mallonga esperantlingva parolado la originon kaj nunan strukturon de UEA kaj de la Universala Kongresoj de Esperanto kun emfazo pri la 59a UK en Hamburgo kaj ĝia programo. En la fino la prezidanto ripetis la inviton al la registaroj oficiale reprezentigi en Hamburgo. S-ro Lins tre bone interpretis en la germana ankaŭ tiun paroladon. D-ro W. Bormann donis pliajn ĝisdatajn informojn pri la Kongreso. Sekvis trarigardo de malgranda, sed ege trafa ekspozicio de gravaj verkoj en la Internacia Lingvo. Dum libera konversacio estis eble doni pliajn informojn pri la lingva situacio en la mondo, pri la nuna stato de la Esperanto-movado kaj la atingoj de la Internacia Lingvo. Ĉiuj diplomatoj ricevis apartan dosieron kun bazaj dokumentoj pri Esperanto en la germana, angla aŭ franca, inter kiuj la konata dokumento CED/7 "Bazaj faktoj pri la Internacia Lingvo".

La interesiĝo de la diplomatoj estis vere granda, kaj iliaj reagoj ĝenerale tre favoraj. Pluraj promesis instigi siajn respektivajn registarojn reprezentigi en Hamburgo. Entute bonega aranĝo, sub tre alta nivelo, kiu sendube kontribuis al pli bona kompreno de la celoj kaj idealoj de la Esperanto-Movado.

REZULTO DE LA ELEKTOJ

Novaj komitatanoj B

KIEL ANONCITE en la februara numero de nia revuo (p.39), ĉi-jare okazis la elektoj por la komitatanoj B de UEA, por la oficperiodo 1974-1977. Ĝis la limdato por la kandidatigo — la 1-a de februaro 1974 — alvenis validaj proponoj por entute 14 kandidatoj por ses lokoj en la Komitato de UEA. En la skriba voĉdono, konforme al la art. 28 de la Ĝenerala Regularo, rajtis partopreni 1294 ĉefdelegitoj kaj delegitoj de UEA. Meze de aprilo estis dissenditaj voĉdoniloj, kiujn necesis resendi al la Centra Oficejo ĝis la 8a de junio ĉi-jare. Dum la printempa kunsido de la Estraro de UEA, kiel membroj de la komisiono por la nombrado de voĉoj estis nomitaj, krom la direktoro de la C.O., individuaj membroj de UEA: s-ro J. Calado, f-ino S. van Wijngaarden kaj s-ro J.Th. de Goeij. La komisiono nombris la voĉojn la 8an de junio 1974 kaj konstatis, ke entute estis ricevitaj 746 validaj kaj 18 nevalidaj voĉdoniloj. La nombrado de la voĉoj ĉeestis ankaŭ f-ino M.H. Vermaas, komitatano de UEA, kaj s-ro E.J. Woessink, estrarano de la Asocio.

La ĉefdelegitoj kaj delegitoj voĉdonis jene:

Čolić, S.	217	Peeraerts, P.	160
Felsö, P.	177	Pettyn, A.	312
Genčev, G.	80	Régulo Pérez, J.	539
Greutert, K.	261	Söderberg, K.	348
Lapenna, I.	622	Thierry, J.	430
Luin, F.	195	Triolle, R.	219
Moritz, U.J.	295	Vermaas, M.H.	511

Sekve, kiel komitatanoj B estas elektitaj: I. Lapenna, A. Pettyn, J. Régulo Pérez, K. Söderberg, J. Thierry kaj M.H. Vermaas. Ilia oficperiodo komenciĝas per la unua kunsido de la Komitato de UEA dum la 59a UK en Hamburgo. Komparante la rezultojn de la ĉi-jaraj elektoj por la komitatanoj B kun la samcelaj elektoj en kelkaj antaŭaj jaroj, oni rimarkas, ke la interesiĝo de la voĉdonantoj ĉi-jare estis pli granda ol antaŭe: en 1962 voĉdonis 52,5, en 1964 — 50, en 1967 — 49, en 1971 — 23,6, kaj ĉi-jare 59 procentoj de la delegitoj. (En 1969 okazis nur parta voĉdono). Kvankam ĉi-jare inter la dissendo de la voĉdoniloj kaj la voĉdona limdato pasis iom pli da tempo, ol estas antaŭvidite laŭ la Ĝenerala Regularo, ankaŭ post la limdato la Centran Oficejon atingis pli ol 30 voĉdoniloj, kio ŝuldiĝas al nereguleco de poŝtaj servoj en kelkaj landoj (ekz. Italio). La malfrue venintaj voĉdoniloj, kompreneble, ne estas kalkulitaj en la supra rezulto.

Sugestoj

pri agadprogramo de UEA por la sekvanta trijara periodo (1974–1977)

La faktoj prezentitaj en la aprila ĉefartikolo — efektive nur eta frakcio de la bedaŭrinda realaĵo — jam produktis plurajn pozitivajn efikojn. Tri el ili elstaras. Unue, la artikolo rezultigis amasan partoprenon en la elekto de komitatanoj B: duoble pli grandan ol iam antaŭe. Due, ĝi elvokis konsciiĝon pri la seriozeco de la afero kaj ebligis al la grandega plimulto esprimi sian firman subtenon al la ĝisnuna agadlinio de UEA. Trie, la artikolo devigis preskaŭ ĉiujn el tiu malgranda, sed des pli laŭta grupo, kiu jam dum jaroj sen-alternative subfosas ĉion pozitivan, klare identigi sin.

Precize kiel antaŭvidite en la artikolo, la kampanjo de senprecedencaj inventaĵoj, prisilentoj kaj nigrigoj intensiĝis kaj plu intensiĝas per tekstoj en 2–3 konataj periodaĵoj, per “strikte konfidencaj” kaj aliaj cirkuleroj, k.s., inkluzive eĉ pamfleton en versoj, cetere sufiĉe infanecaj por la iama verkinto de “La Infana Raso”. Ĉiu ricevinto de tiuj tekstoj formu sian propran opinion. Mi mem rezignas je kia ajn reago, sed nur ripetas, ke nenia plua progresado estas imagebla sen radikala forigo de tiu negativa fenomeno.

Tute egale, ĉu en la nuna situacio, malgraŭ la amasa apogo de la membraro, mi estos preta akcepti kian ajn rolon en la plua gvidado de la Asocio, pro mia nuna pozicio mi rigardas kiel mian devon prezenti sube kelkajn sugestojn pri la esencaj taskoj de UEA en la sekvanta periodo por konsidero de la membraro kaj de la nova Komitato en Hamburgo.

1. Enkondukaj konsideroj

1.1 Unike favoraj kondiĉoj. Kiel antaŭvidite antaŭ multaj jaroj kaj ripetite en la Madridaj Tezoj (1968), en ĉiuj siaj kompleksaj aspektoj la lingva problemo daŭre akriĝas kaj tial ĉiam pli impete postulas radikalan solvon. La nuna dinamismo sur la lingva kampo — spegulanta la ĝeneralan dinamismon en la internaciaj rilatoj — klare indikas, ke el ĉiuj teorie eblaj solvoj, la evoluprocezo pleje favoras tiun, por kiu pledas la Esperanto-movado, ĉar ĝi prezentigas kiel sintezo de la konfliktantaj interesoj inter naciismo kaj universalismo: la firma volo de la nacioj kaj etnaj grupoj konservi siajn respektivajn lingvojn kiel la ĉefajn elementojn de siaj identecoj, unuflanke, kaj la postulatoj de komunikado sur ĉiuj niveloj, aliflanke. Ĝi estas spontana procezo, kondiĉita de la tuta evoluo en la sfero de materiaj fortoj, sed ĉiun spontanon procezon eblas rapidigi favore al difinita solvo per celkonscia, organizita laboro, se tiu laboro respondas al la ĝenerala evolutendenco.

1.2 Rolo de Esperanto-organizaĵoj. La ekzisto mem de la Esperanto-organizaĵoj, unuavice de UEA, havas

sencon nur, se la supraj premisoj estas ĝustaj. Abundaj faktoj kaj sciencaj analizoj en la verko *Esperanto en Perspektivo*, aperonta en 1974, montras ankoraŭfoje, ke ili estas ĝustaj kaj ke bone organizitaj agadoj, inter si kunligitaj en granda unueca tuto, povas kaj devas haltigi la altrudadon de la t.n. grandaj naciaj lingvoj kaj fine rezultigi la ĝeneraligon de la uzo de Esperanto por internacia komunikado kun samtempa konservo de la naciaj kaj etnaj lingvoj.

1.3 Konvinko sen defetismo. La solvo de la lingva problemo per Esperanto, kun ĉiuj pozitivaj kromefikoj, devas esti afero ne de naiva espero, sed de firma konvinko bazita sur objektiva takso de faktoj kaj evolu-tendencoj. Foresto de tia konvinko estas fonto de duboj, ŝanceliĝoj, utopiismo kaj, lastatempe, eĉ de defetismo. Evidente, en la gvidaj instancoj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj devas troviĝi personoj, kiuj pro sia profunda konvinko kaj sindono, kiun ĝi nutras, estas kapablaj mem firme agi kaj disradii ĉirkaŭ si senkompromisan firmecon. Defetismo ne estas allasebla sur kiu ajn nivelo de batalanta movado, ankoraŭ tro malforta kaj nombre kaj finance kompare kun la grandaj lingvaj imperiismoj kaj iliaj malpli grandaj satelitoj.

2. Fundamentaj celoj

2.1 Nombra kresko. La du ĉefaj celoj laŭ la Statuto — disvastigi la lingvon kaj plifaciligi ĉiaspecajn rilatojn inter la homoj — plu restas validaj. Tio signifas, ke necesas maksimume streĉi la fortojn por grandigi la nombron de Esperanto-parolantoj. La spertoj montras, ke nur la elprova formulo de altkvalita, samtempa, paralela kaj kunligita triobla aktivado — informado, instruado, praktikaj aplikoj — donas pozitivajn rezultojn. Malatentado de nur unu el la tri branĉoj egalas al superfluaĵoj de tempo kaj rimedoj. Eĉ la plej brilaj atingoj en kiu ajn medio, aŭ rekonoj fare de kiu ajn, eĉ de la plej altaj mondaj, regionaj aŭ landaj instancoj havas nur tiom da fakta valoro, kiom niaj organizaĵoj aŭ unuopaj aktivuloj kapablas ekspluati ilin por kreskigi la nombron de Esperanto-parolantoj. Tiu kreskigo, facile atingebla per harmoniigitaj komunaj klopodoj en la nuna escepte favora ekstera situacio, aŭtomate realigas la duan celon, ebligas ampleksigon de praktikaj servoj kaj tial, siavice, faciligos plian disvastigadon de la lingvo. La du celoj, apogantaj unu la alian, estas neimageblaj unu sen la alia.

2.2 Lingva unueco. Por rapidigi la solvon, necesas ke la Internacia Lingvo estu maksimume perfekta, tiel ke en ĉiu momento ĝi taŭgu por ĉiuj bezonoj de komunikado. Tio altrudas la devon daŭre evoluigadi ĝin, precipe en diversaj fakoj, praktike ĝin uzadi kaj riĉigadi per plia kultura enhavo, sed samtempe rigore konservadi ĝian absolutan unuecon. En kondiĉoj de plia, eble eĉ konsiderinda disvastigo de Esperanto, la rolo de la Akademio kiel rekonita gardanto de la lingva unueco laŭ la Fundamento, fariĝas eĉ pli grava. Tial, rigora observado de la decidoj kaj rekomendoj de la Akademio estas nepre antaŭkondiĉo de ĉia ajn plua sukcesa laboro por Esperanto. Atakoj kontraŭ la aŭtoritaton de la Akademio, aŭ atencoj al la digno kaj scienca reputacio de ĝiaj membroj, estas kondamnindaj kiel rekta sabotado de la laboro por la Internacia Lingvo.

3. Esencaj agadtaskoj

La realigado de la celoj dependas de la plenumado de multnombraj taskoj en la tri ĉefaj agadbranĉoj. La subaj, sistemigitaj en grupoj, prezentiĝas kiel esencaj:

3.1 Esploroj kaj dokumentado. Plua evoluigo de CED laŭ ĝia Laborplano; ĝisdatigo kaj regula publikigado de *LMLP* kun pli da emfazo je la solvo de la lingva problemo per Esperanto; vasta utiligo de la publikaĵoj de CED, precipe de *Esperanto en Perspektivo* kaj *Pri Internacia Lingvo* por studoj en superaj kursoj kaj tradukoj konforme al la sugestoj en la antaŭparolo de la verko.

3.2 Informado. Aktivigo de ĉiuj ekzistantaj IF-oj, kreo de novaj en landoj sen IF, harmoniigo de ilia laboro laŭ la Principaro de Frostavallen kaj la verketo *Por pli efika informado*; sistema utiligado de la publikaĵoj de CED; ĉesigo de ĉiuj nunaj bultenoj kaj, anstataŭe, publikigo de populara monata periodaĵo “Esperanto tra la Mondo” (aŭ simila titolo) kun artikolo-

loj kaj informoj pri ĉiaspecaj lingvaj malfacilaĵoj kaj pri la progresado de Esperanto; evoluigo de la KGS; reenkonduko de artikola servo; informa laboro aparte direktita al Afriko, Azio kaj Suda Ameriko pere de la tieaj LA aŭ kernoj kaj pere de la LA en la hispane, angle kaj france parolantaj landoj; kursoj por aktivuloj.

3.3 Eksteraj rilatoj. Fortikigo de la kunlaboro kun Unesko, UN, aliaj RO-j kaj ĉiuj NRO-j en konsultaj rilatoj kun Unesko; ligoj kun aliaj NRO-j, kondiĉe ke la neŭtraleco de UEA estu observata; intensa partopreno en la Kontraŭrasisma Jardeko (*Esperanto*, majo, 1974); establo de kunlaboro inter la LA kaj la landaj Unesko-komisionoj konforme al jam donitaj sugestoj; plua eldonado de Unesko-Novaĵoj; kuraĝigo de regionaj agadoj en Suda Ameriko, Afriko kaj Azio; kunordigo de agadoj en Eŭropo pere de EEC kaj rektaj intervenoj ĉe ĉiuj eŭropaj instancoj.

3.4 Junularo. Aktivigo de la junulara sekcio direkte al ĝia ĉefa celo: disvastigi la lingvon inter la junularo per adekvata informado, kursoj, praktikaj servoj kaj fondo de junularaj grupoj, precipe en universitatoj kaj lernejoj.

3.5 Fakaj medioj. Helpo al fakaj asocioj por efika agado en fakaj medioj (propraj laborplanoj urgus) kaj subteno de la FA al la laboro de UEA; vastigo de kunlaboro kun la instruista, sciencista kaj skolta organizaĵoj; aparta atento al turismo kaj aŭtomobilismo, komerco kaj industrio; helpo en fondado de novaj FA; apogado de klopodoj publikigi fakajn terminarojn, kompetente verkitajn (ev. en la Dua Parto de la Jarlibro).

3.6 Instruado. Konsiderinda intensigo de instruado laŭ ĉiuj taŭgaj metodoj kaj sur ĉiuj niveloj, inkluzive kursojn en lokaj societoj konforme al faktoj kaj ideoj en Ĉap. 4 de *Esperanto en Perspektivo*; helpo al ILEI en ĝiaj agadoj, precipe rilate regionajn lernejajn eksperimentojn kaj ĝenerale instruadon en lernejoj; reeldono de “ŝlosiloj”, tute modernigitaj.

3.7 Kultura riĉigo de la lingvo. Aldone al funkciantaj agadoj, nova popularscienca serio kun prelegoj faritaj en ISU; forta apogo al Esperantaj radio-elsendoj; helpo al diversaj agadoj kun vere kultura karaktero, organizataj ekster UEA, en formo de aŭspicioj kaj alimaniere.

3.8 Praktikaj aplikoj. Aldone al la ekzistantaj servoj (koresponda, magnetofona, k.a.), vastigo de la delegita reto, precipe laŭ fakoj kun la helpo de la FA; helpo al organizado de fakaj konferencoj fare de la FA; plibonigo de fakaj kunvenoj dum la UK.

3.9 Progresigo de internacia solidareco. La tuta laboro estu inspirita de humanisma internaciismo interne de la Movado kaj en ĉiuj eksteraj agadoj, unuavice en ligo kun la Kontraŭrasisma Jardeko.

4. Urgaj organizaj taskoj

4.1 Statuto kaj aliaj bazaj dokumentoj. Antaŭ 1976 (Art. 1 de la Statuto) amendi la Statuton kaj sekve ĉiujn regularojn de UEA, cele al reduktado de la membrokategorioj; plia demokratigo por vastigo de la rajtoj



La Centra Oficejo de UEA en Roterdamo: "Simpligo kaj senburokratigo".

de individuaj membroj, referendumoj, ebligo formi rektajn sekciojn en landoj sen LA, pluraj malpli gravaj precizigoj; reorganizi la junularan sekciojn laŭ la principo de maksimume ebla memstareco, sed nur en la limoj de la Statuto de UEA; realeca perspektiva laborprogramo.

4.2 Komitato kaj Estraro. Aktivigo de kiel eble plej multaj komitatanoj por plenumado de difinitaj taskoj; prestiĝa, reprezenta kaj laborkapabla Estraro, ĝuanta plenan apogon de la Komitato en la malfacila tasko konsciencie realigadi la aprobitan laborprogramon (Principaro pri elekto de la Estraro estos prezentita en Hamburgo).

4.3 Centra Oficejo. Simpligo kaj senburokratigo de la tuta administrado laŭ la baza koncepto, ke oficejo de kultura, batalanta organizaĵo kiel UEA ne povas sukcese labori laŭ la metodoj de grandaj komercaj entreprenoj, sed ĝian laboron devas inspiri sindediĉo, kamaradeca rilatado, komuna respondecosento kaj lojaleco al la gvidaj instancoj por povi kontentige funkcii; liberigo de la CO de ĉiuj taskoj, kiuj povas esti farataj ekster ĝi de kompetentaj sindonaj volontuloj, ev. kun modestaj kompensoj; sekve redukto de la nombro de geoficistoj kaj ŝparoj je salajroj kaj materiaj elspezoj.

4.4 Sanigo de la financa situacio. La realigo de 4.3, redukto de membrokategorioj kaj aliaj simpligoj aŭtomate malaltigos la elspezojn; se nepre necese pro la

forta inflacio, altigado de la kotizoj paralele kun la altigado de la kostoj; elradikigo de negativaĵoj kaj celtrafa laboro kun videblaj rezultoj sendube kuraĝigos donacojn, testamentaĵojn kaj aliajn formojn de materia apogo, kio siavice helpas al ekvilibro de la enspezoj kaj elspezoj.

4.5 LA kaj FA. Firmigo de la ligoj inter la centraj organoj kaj la organoj de la LA kaj FA; helpo rilate ellaboron kaj realigadon de adekvataj laborprogramoj de LA kaj FA, kun aparta atento al modernigo kaj aktivigo de la lokaj societoj kaj junularaj grupoj, precipe en landoj, kies organizaĵoj konsiderinde regredis en la lastaj jaroj; sugestoj por fondo de novaj LA, FA, lokaj societoj, grupoj aŭ sekcioj.

4.6 Rolo de unuopulo. Altiri ĉiujn videblajn kaj latentajn pozitivajn fortojn al maksimuma libervola aktiviĝo en la laboro por Esperanto sur loka, landa, regiona, monda aŭ faka niveloj, depende de la kompetentecoj kaj inklinoj, konforme al la nekontestebla fakto, ke sindona laboro estas kaj restos dum longa tempo nia plej granda valoro.

4.7 Fortikigo de UEA. Intensigo de la kampanjo por altigo de la membronombro; klopodoj membrigi apogantojn kaj apogantajn organizaĵojn laŭ Art. 12 kaj 18 de la Statuto; popularigo de la Asocio per artikoloj, modelaj prelegoj, revivigo de aparta bulteno kun informoj pri la atingoj de la Asocio.

4.8 Harmoniigo de agadoj. Prilaboro de la unuopaj eroj de la Trijara Programo per artikoloj, prelegoj, diskutoj sur ĉiuj niveloj, k.s.; reenkonduko de la rubriko "Taskoj de la monato" en la revuon *Esperanto* kaj enkonduko de simila rubriko en la organojn de la LA; senkompromisa forigo de intencaj aŭ neintencaj misprezentadoj pri faktoj, defetismo kaj similaj negativaĵoj, eventuale per konstanta rubriko en *Esperanto* kaj, en ekstremaj kazoj de malica obstino, per apliko de Art. 20 de la Statuto.

5. Konkludo

La sukcesa realigado de la Trijara Laborprogramo dependas, interalie, de la strikta observado de aktiva neŭtraleco kiel nepara kondiĉo de universaleco, kaj ankaŭ de aliaj bazaj konceptoj menciitaj en la aprila artikolo (p. 61) kaj detale pritraktitaj en *Esperanto en Perspektivo*.

En simila situacio, sed pro tute aliaj kaŭzoj, mi skribis en la jugoslavia *La Suda Stelo* en 1939: "Nian tutan energion ni devas antaŭ ĉio dediĉi al la laboro por disvastigo de la lingvo kaj la eventualan 'plus-energion' kaj atakemon ni prefere direktu kontraŭ niajn komunajn malamikojn, ol kontraŭ nin mem". Tiuj vortoj eĥis tre pozitive en la tiama jugoslavia Esperantomovado. Mi povas nur ripeti ilin por atenta konsidero de la membraro, ĉi-foje de nia monda organizaĵo.

Ivo Lapenna

La heroa revuo


Dum kelkaj lastaj jaroj, japanoj komencas konfuzi la mondon per sia eldona aktiveco en la Internacia Lingvo, des pli, ke kelkfoje temas pri aŭdacaj paŝoj preskaŭ ĉe la rando de aventuro. Tamen, la aferoj marŝas tie, kion pruvas ankaŭ la fakto, ke la eldonejo "Iudovikito" jam lanĉis ankaŭ la trian volumon de la "Kompleta verkaro de L.L. Zamenhof". Ĵus atingis nin ankoraŭ unu plia informo pri nova giganta eldona entrepreno de japanoj: Temas pri la represo de ĉiuj numeroj de "Literatura Mondo", la plej prestiĝa kultura revuo en la tuta historio de la Internacia Lingvo. Kaj, ne temas pri planoj por fora estonteco, sed pri preskaŭa realaĵo. En Tokio jam funkcias Kooperativo por represo de "Literatura Mondo", kiu anoncas, ke la unua el entute ses volumoj estos preta en aŭgusto ĉi-jare, kaj la lasta volumo aperos en printempo 1975. La prezo de la kompleto estos iom pli ol 300 guldenoj, la eldonkvanto — 300 kompletoj. Ni petis s-ron William Auld skizi por niaj legantoj la gravecon de la represota revuo.

DEK SES JARKOLEKTOJ inter 1922 kaj 1949. Sume 3 148 grandformataj paĝoj. Sur tiuj paĝoj debutis kaj evoluis preskaŭ ĉiuj talentoj de nia literaturo dum la koncerna periodo; sen ili, ĉu nia kulturo — kaj nia Movado entute — starus ĉe la nivelo efektive atingita? Sen *Literatura Mondo*, ĉu la lingvo mem estus hodiaŭ tiel fortika kaj subtile esprimiva, kiel ĝi estas? Preskaŭ certe la respondo al tiuj demandoj estas: Ne!

Kiam oni foliumas tiujn kajerojn, oni miras pri la abundo kaj kvalito de la legaĵo siatempe liverita al la esperantistoj pere de tiu unusola revuo. Mi scias, ke ne ĉiuj interesiĝas pri la poezio, tamen, ĉar tio estas mia fako, mi iam kompilis indekson tiuteman, kaj povis konstati la konsternan fakton, ke sole en *LM* aperis sume 423 originalaj poemoj, kaj 620 poemoj tradukitaj el 31 lingvoj! Apenaŭ oni trovas en la tuta mondo, en kiu ajn lingvo, revuon kun simila pretendo.

Oni devas aldoni, ke la traduknivelo estas mirige alta. Ekde la komenco, sub la gvidado de la geniulo kaj brilega redaktoro Kalocsay, oni postulis de la kunlaborantoj plej altan gradon de fideleco forma, enhava kaj etosa al la originalaj verkoj. Rezultis por la feliĉaj posedantoj de tiuj kajeroj trezorejo de la tutmondaj ĉefverkoj, poemoj de i.a. Shakespeare, Burns, Vrchlicky, Li Tai-Po, Liiv, Goethe, Verlaine, Petöfi, Puŝkin, k.m.a. Kaj sur la kampo proza la sama situacio estas rimarkebla. Kiel la poezian, tiel ankaŭ la prozan Esperanton poluris la talentoj allogitaj kaj kuraĝigitaj ĉirkaŭ la budapeŝta centro. La juna literaturo Esperanta nepre bezonis tian aŭtoritatecan stimulilon, kiu povis kunigi la fortojn kaj varti la burĝonantajn verkemulojn. Kun respekto al aliaj revuoj, tia centra kaj samtempe tutmondeca organo tre mankas al nia hodiaŭa Movado. Multajn unikajn servojn faris *LM*. De tempo al tempo oni publikigis kajeron tute dediĉitan al unuopa nacia kulturo, ĝenerale ne tre bone konata laŭ tutmonda skalo: la pola, la latva, la ĉeĥa, k.a. Estas notinde, ke aperis ne nur literaturo sed ankaŭ aliaj artaĵoj de la koncerna lando: efektive la aspekto kaj arta aranĝo de la kajeroj konsistigas gravan parton de ilia daŭra valoro.

Ankaŭ la recenza arto atingis novajn sukcesojn, ĉu en *LM* mem, ĉu en la kajeroj de *Lingvo-Libro*. El hodiaŭa vidpunkto, la kompleto de *LM* estas



perfekta antologio de la Esperanta literaturo 1922-1949; kompilinto de tia antologio estus devigata trovi la pliparton de sia materialo ĝuste en tiuj kajeroj — kiel mi devis fari, kompilante la poezian *Esperanta Antologio*. Oni scias tre bone, ke ekzistis aliaj revuoj altkvalitaj, aliaj eldonaĵoj, eĉ kelkaj unuopaj verkistoj, kiuj neniam fakte kontribuis al *LM*. Tamen en *LM* aperigis siajn verkojn, almenaŭ de tempo al tempo, preskaŭ ĉiuj famaj esperantistoj; kaj en la kajeroj aperis, anticipe al libroforma presiĝo, eltiraĵoj kaj ĉapitroj — kaj ne malofte, felietone, kompletaj libroj — el verkoj, kiuj jam delonge ne plu estas aĉeteblaj, kaj do restas pli-malpli nekonataj al la junaj generacioj de esperantistoj.

Manko de scio pri la pli frue farita laboro jam plurfoje kondukis ĝis tio, ke oni retradukas (ne ĉiam tiel kontentige) poemojn kaj prozaĵojn, kiuj siatempe

aperis, interalie en *LM*. Komplete de *LM* estas absolute necesa posedaĵo de ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la historio de nia lingvo, aŭ de nia literaturo, kaj de ĉiuj, kiuj volas posedi la tradician kulturon de Esperanto. Ĝi estas necesa posedaĵo de ĉiuj, kiuj volas kaj ambicias mem kontribui al la plua evoluo de tiu literaturo, tiu kulturo. Kaj ĝi estas tre dezirinda posedaĵo de ĉiuj, kiuj volas vere posedi la lingvon, kiuj amas spritan kaj interesan legaĵon — nome, al ĉiuj, kiuj amas nian lingvon. Ĝiaj 3 148 paĝoj donas neelĉerpeblan fonton de plezuro, instigo kaj instruigo.

Kaj, kiel ĉiam la valora literaturo, ili plejparte ne perdis sian freŝecon pro la tempopasado. *LM* retenas hodiaŭ sian iaman valoron; kaj pro tio ĝi registriĝas inter la heroaj revuoj (neniam tre abundaj) de la tuta mondo.

William Auld

Japanoj en Pekino



Laŭ la oficiala invito de Ĉina Esperanto-Ligo, 8-membra delegacio de japanaj esperantistoj el Tokio, Sizuoka, Nagoya, Kioto kaj Kyusyu, vizitis Ĉinion dum 2 semajnoj en aprilo. Ili estis varme akceptitaj de nombro da ĉinaj esperantistoj, plejparte el la redakcio de “El Popola Ĉinio” kaj Esperanta sekcio de Fremdlingva Eldonejo, interalie s-roj Hujucz kaj Jelaiŝi, gvidantoj de ĈEL. La delegacio vizitis ĉefe tri grandajn urbojn — Pekino, Ŝanhajo kaj Kŭangĉoŭ — kie ili estis kondukitaj al diversaj en- kaj ĉirkaŭurbaj fabrikoj, lernejoj, hospitaloj, farmoj, muzeoj ktp., tiel ke ili bone konceptis la progresantan evoluadon de Ĉinio. Dum la tuta restado de la delegacio, ĉinaj kaj japanaj esperantistoj povis senpere preparoli diversajn aferojn, ĉefe amikajn interŝanĝojn de opinioj pri la ambaŭlandaj aktivecoj. Krome, la esperantista vizitantoj interesis la alilingvajn vizitantojn en la lando per la lingva senpereco.

Sur la foto en Hotelo Pekino gajas la du-landaj reprezentantoj. (Foto el “La Revuo Orienta”, kaj informo el la artikolo de s-ino Yukiko Isobe en Nippon Keizai Sinbun, 1974 05 17).

Ĉu ŝanco por Afriko ?

Se jam radio siatempe signifis revolucion en la komunikado, la ĉiam pli vasta utiligado de la televido signifas duan kaj ne malpli gravan etapon de tiu revolucio. Unesko denove planas grandiozan projekton sur la eduka kampo, kiu devus realiĝi helpe de telekomunikaj satelitoj, — instruado pere de la televido. Ankaŭ tiu ĉi projekto de la monda organizaĵo por la edukado, scienco kaj kulturo ignoras, unu plian fojon, la realaĵon en la sfero de la baza komunikilo — la lingvo.

MEZE DE MAJO ĉi-jare, 160 delegitoj de 46 landoj konferencis en Bruselo pri la internacia kunlaboro en la kampo de la televido. Malfermante la konferencon, kies ĉefa celo estis ellabori internacian konvencion pri la protektado de la televidaj programoj transsendataj pere de satelitoj, la ĝenerala direktoro de Unesko atentigis, ke la satelita komunikado, interalie, ebligas al la evolulandoj pere de “tele-edukado” solvi la ĉefajn problemojn sur tiu kampo.

Laŭ atentigo de nia franca kunlaboranto s-ro D. Cornice, la problemon de la edukado pere de telekomunikaj satelitoj traktis ankaŭ alia internacia konferenco, kiu antaŭ kelka tempo okazis en Addis Abeba, la ĉefurbo de Etiopio. Temis pri kunveno en kiu reprezentigis dudek tri afrikaj ŝtatoj por studi la eblecojn de utiligo de artefaritaj telekomunikaj satelitoj por edukaj elsendoj en la landoj sude de Saharo. Kvankam ĉio ĉi estas nur projekto, pluraj faktoj menciitaj dum tiu kunveno ŝajnas tre interesaj.

En klopodoj malkovri kiel eble malpli longan vojon por solvi siajn edukajn problemojn, Afriko nuntempe elspezas grandegajn sumojn por ekmajstri la modernan telekomunikan teknikon kaj utiligi ĝin por progresigi siajn edukajn sistemojn. Laŭ ĝenerala opinio de edukaj ekspertoj, transsendo de edukaj televidaj programoj pere de satelitoj povus komenciĝi jam post kelkaj jaroj, kvankam tiu sistemo povus atingi plenan ekspluatadon nur en la lastaj jaroj de ĉi tiu jarcento. Krom tio, ke televida edukado pere de satelitoj povus penetri eĉ en la plej forajn regionojn, ĝia avantaĝo estas ankaŭ la fakto, ke ĝi ebligus produktadon, taŭgan por pluraj landoj samtempe.

La lingva STOP !

GRUPO da flandraj membroj de Belga Parlamento, la 4an de julio 1974, dufoje haltigis ekspresan trajnon inter Oostende kaj Lieĝo uzante la alarmo-bremson. La kaŭzo estis la konstato, ke la konduktoro parolas nur la francan, kvankam, laŭ la komplika lingva leĝaro de Belgio, li devas sciopovi ankaŭ la flandran lingvon.

Studo de Unesko atentigas, ke en la lasta jardeko de la jarcento, edukaj programoj pere de satelitoj povus ampleksi tridek kvin landojn en Afriko kaj ŝpari konsiderindajn sumojn, kompare kun la tradicia eduksistemo. Laŭ tiu studo, oni planas disdividon de Afriko je orienta kaj okcidenta regionoj, forlasante tiamaniere la kutiman disdividon en anglalingvan kaj franclingvan zonojn. La projektata sistemo de eduka televido por Afriko konsistus el centra elsenda stacio, ekipita per ses televidaj kanaloj, 24 radio- kaj 24 transsend-stacioj. Du satelitoj nutrus per programo po tri televidajn kaj 12 radio-staciojn, ĉiuj anstataŭigeblaj per la restanta nombro de kanaloj kaj stacioj en kazo de paneo. Surtere, estus instalitaj riceviloj en 800 000 komunumaj centroj, 700 000 lernejoj kaj 100 000 plenkreskulaj edukaj centroj. Oni kredas, ke tia sistemo povus, en la jaro 1999, atingi 80 milionojn da lernantoj kaj instruistoj kaj preskaŭ 50 milionojn da plenkreskuloj sude de Saharo.

El la ĉiutagaj 144 horoj da elsendado, kvarono estus dediĉita al la unuagrada lerneja instruado, kvarono al la dua kaj supera instrugradoj, triono al plenkreskulaj edukaj programoj, kaj la resto de 24 elsendo-horoj apartenus al kulturaj kaj sportaj programoj. Ĉio ĉi devus kosti, laŭ la menciita studo de Unesko, unu miliardon da usonaj dolaroj.

La lingva obstaklo menciigas en ĉiuj ĉi planoj — nur laste kaj, laŭ miopaj pritaksoj de la ekspertoj de Unesko, ĝi povus montriĝi malpli granda ol ŝajnas unuavide. Lernejoj programoj povus esti elsendataj en ok lingvoj, dum oni por la plenkreskulaj kursoj bezonos 48 lingvojn. Unesko kalkulas, ke, elsendante en la svahila, haŭsa, joruba, amhara, iboa, fulania, lingala kaj angla, eblus atingi duonon da enloĝantoj sude de Saharo. La alian duonon da afrikanoj sude de Saharo oni tute ne mencias en la projekto de Unesko, nek oni tie klarigas kiel agordi la projekton kun la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies artikolo 26 parolas pri la rajto je edukiĝo. Ignorante en siaj projektoj la gravecon de la lingva problemo, Unesko tiamaniere “projektas” ankaŭ pluan lingvan kaoson en la mondo, konscie allasante diskriminaciajn solvojn en la realigo de unu el la bazaj homaj rajtoj.

sm



La ekspozicioj de Oomoto en Londono (maldekstre) kaj Roterdamo (dekstre) allogis milojn da vizitantoj, inter kiuj estis ankaŭ multaj esperantistoj. Sur la maldekstra foto: Ges-roj T. Juri, A.W. Rowe kaj K. Markarian en la inaŭguro de la londona ekspozicio.

La arto de Onisaburo

EKDE AŬTUNO 1972, Oomoto aranĝis en Eŭropo plurajn ekspoziciojn de la arto de la fondinto de ĉi tiu religia movado Onisaburo kaj kelkaj aliaj membroj de la familio Deguĉi. Temas pri impona kolekto de ceramikaĵoj, pentraĵoj, kaligrafiaĵoj kaj teksaĵoj, kies elmontro postulas plurajn ekspoziciajn salonojn. Ĝis nun la ekspozicio okazis en kvin francaj urboj (Parizo, Besançon, Marsejlo, Nico, Caen), en Londono kaj Roterdamo. Post la roterdama ekspozicio, kiu okazas en la renoma Etnografia muzeo (Willemskade 25) ĝis la 1-a de septembro ĉi-jare, la ekspozicio migros al la belga urbo Gent.

Kiel konate, Oomoto jam pli ol kvindek jarojn vaste uzas la Internacian Lingvon kaj ĝia kontribuo al la Esperanto-movado restas granda kaj respektinda. An-

kaŭ la menciitaj ekspozicioj en specifa maniero kontribuas al la popularigo de la Internacia Lingvo, ĉar la organizantoj regule substrekas la rolon, kiun Esperanto ludis kaj ludas en la disvastigo de Oomoto. Tiajn emfazojn ekz. nur en la inaŭguro de la londona ekspozicio, en la fama Muzeo de Viktoria kaj Albert, aŭdis pli ol 1 500 invititoj, inter kiuj troviĝis multaj eminentuloj de la brita kultura vivo. Simile okazis ankaŭ en la ekspozicioj en Francio kaj Roterdamo, kie la inaŭguron ĉeestis ankaŭ la urbestro. En la ekspozicioj regule deĵoras oomotanoj parolantaj la Internacian Lingvon kaj dum la daŭro de la ekspozicio oni plurfoje aranĝas vesperojn de japanaj muziko kaj dancoj. Krome, en la recenzoj pri la ekspozicio, en la gazetaro, radio kaj televido, Esperanto estas ofte menciata.

SOVETAJ REVUOJ PRI ESPERANTO:

Por milionoj

PLURAJ popular-sciencaj revuoj en Sovet-Unio aperigis dum kelkaj lastaj monatoj tutan aron da artikoloj pri la Internacia Lingvo kaj temoj ligitaj al ĝi. La monata revuo *Znanie – sila* (“Scio estas forto”) aperigis ampleksan prezenton de *Plena Ilustrita Vortaro*, alte aprezante la verkon. En la junulara magazino *Vokrug sveta* (“Ĉirkaŭ la mondo”), kies tradicio estas longa pli ol unu jarcenton, aperis artikolo de A. Ĥarkovskij “Homo, kiu iris al ĉielarko”. Temis pri la fama blinda poeto Vasilij Eroŝenko, kies ligojn kun la Internacia Lingvo la artikolo plurfoje emfazis. *Teknika*

i nauka (“Tekniko kaj scienco”) prezentis al siaj legantoj intervjuon kun la gvidantoj de la Esperanto-komisiono en la Unuiĝo de sovetaj societoj de amikeco kun eksterlando M. Isaev kaj D. Armand, sub la titolo “Esperanto – lingvo de la estonteco”. Krome, menciinda estas ankaŭ la longa artikolo “Nemaljuniĝanta Esperanto”, aperinta en la ĉefa armea ĵurnalo *Krasnaja zvezda* (“Ruĝa stelo”).

Necesas aparte emfazi, ke la menciitaj periodaĵoj aperas en pluraj milionoj da ekzempleroj. Se oni, krome, memorigas pri la antaŭ nelonge aperinta bonega *Esperanta-rusa vortaro* de E.A. Bokarev, trudiĝas konkludo, ke la Internacia Lingvo en Sovet-Unio regajnas ĉiam pli kaj pli bonan grundon.

Boris Kolker

La flavaj gantoj de Ernest Drezen

Por la fino de ĉi tiu jaro oni planas la eldonon de ampleksa "Biografio de Lanti", kiun verkis s-ro Eduard Borsboom el Nederlando. La nova verko, verŝajne, montriĝos interesa ne nur por tiuj, kiuj scivolas pri la vivo kaj laboro de la fondinto de SAT, sed ankaŭ ĝenerale por ĉiuj, kiuj volas aldoni plian lumon al kelkaj aspektoj de la Movado inter la du mondmilitoj. Kun afabla permeso de la aŭtoro, ni aperigas fragmenton, kiu portretas la plej elstaran figuron en la historio de la soveta Esperanto-movado.

TIAL KE por okcidentano vojaĝi sola en Moskvo entenas konsiderindajn malfacilaĵojn, Nekrasov komplezis akompani Lanti al Kremlo, kie laboris la vizitoto. Apud la enirejo, antaŭ ligna budo, ili enviciĝis por akiri necesan enirpermesilon. Post duonhora atendo ili rajtis kun papereto eniri la grandan portalon. Kontrolado fare de vicoj da soldatoj, paŝado post paŝado tra vicoj da koridoroj. Finfine la ĉambro kun la skriba indiko pri sidejo de ia komitato. Mallonga frapo. "Eniru!". Jen, malantaŭ skribotablo, Ernest Drezen, vicedirektoro de "Tutrusia centra ekzekutiva komitato de sovetoj", prezidanto de Sovetrespublikara Esperantista Unio. Kia homo estis Ernest Drezen? Tiu demando estos en postaj jaroj ofte farata, kaj oni devas konfesi, ke malfacilas formuli kontentigan respondon. Parte pro manko de informoj, kiuj perdiĝis aŭ kiuj ankoraŭ ne estas publike alireblaj, parte ankaŭ pro la komplika personeco, kiun Drezen konsistigis.

Okulfrapis lia denatura sinjoreca konduto. Li flue kaj elegante parolis, senĝene kaj certe moviĝis en plej altaj rondoj, havis agrablajn porsocietajn manierojn kaj posedis delikatan okulon por ina beleco. Resume, li sentis sin hejme en salono. Oni ĉe observo konstatas, ke li trapasis senzorgan junaĝon en bonstata familio, el kiu li naskiĝis en 1892, en la latva urbo Liepaja. Pri lia, por tiel diri, kontraŭproleta eksteraĵo, ekzistas jena anekdoto.


Dum la danziga Universala Kongreso (1927), okazis ekskurso al Varsovio, por viziti la antaŭan loĝejon kaj la tombon de Zamenhof. Granda parto de la kongresanaro samtempe vagonare forvojaĝis el Danzigo. La plej multaj inter ili, ankaŭ postaj eminentuloj, utiligis la trian klason, sed baldaŭ disvastiĝis la onidiro, ke en la unua klaso troviĝis reprezentanto de la proletaro: kamarado Drezen. Tiu neverŝajnaĵo bezonis konkretan kontrolon. Kaj jen bela spektaklo: Tra la unua-klasa koridoro longvice pasis la triaklasuloj preter kupeo, en kiu sur pluŝo sidis sinjoro, leganta ĵurnalon. Unu detalo frapis: li surhavis flavajn gantojn! Efektive

la cetera mondo eraris, — en la lando de l'proletoj supozeble ne regis mizero kaj malriĉo!

Verdire Drezen ne sentis sin feliĉa en la bolŝevista medio, en kiu kulturita homo estis rigardata per skeptikaj okuloj kaj havis malpli da ŝanco akiri certan pozicion ol kiu ajn fanatika kompartiano. Ĉe la eksplodo de la revolucio li baldaŭ komprenis, ke la leninanoj verŝajne estos la gvidantoj en la estonteco. Li metis sin al ilia flanko, por ebligi al si konstrui karieron. La bolŝevistaj vicoj logis en tiu tempo, ĉar mankis spertuloj kaj partianoj por pli altaj oficoj en la registaro. Pro tio, ke li estis kornedo en la rusa armeo dum 1915-1917, li daŭrigis sian militservon en diversaj funkcioj en la Ruĝa Armeo ĝis 1921. Kvankam li lojale agadis por la bolŝevistoj, tiu partio restadis fremda al lia internaĵo. Li daŭre bezonis kaŝi siajn pensojn kaj nur hazarde al intima amiko li povis konfidece diri, ke "li ne povas alkitimiĝi al tiu Rusujo kaj ke ilia kulturo ŝokas lin".

Fama iĝis Ernest Drezen pro sia intelekta laboro. Li estis eksterordinare inteligenta homo. Posedante ne nur la superrigardon super situacio, sed ankaŭ la povon rapide sondi homojn, li preskaŭ anticipe flaris la vojon de la okazontaĵoj.

Dum la gimnazia tempo, en Kronŝtato, li eklernis Esperanton en 1907 kaj baldaŭ flue parolis la lingvon. Kvar jarojn poste, komenciĝis la studo en la teknika altlernejo de Peterburgo. Kun la inĝeniera diplomo (1915) en la poŝo, li eniris la militservon. Proksimume en tiu periodo Drezen edziĝis kun rusino — li mem estis latvo — kaj ekloĝis en Moskvo. Post la stabiliĝo de la revolucio li sinsekve laboris tie kiel vicedirektoro en la pli supre nomita komitato inter 1921 kaj 1924, sciencisto pri racia labororganizo (1924-1926), direktoro de PTT (1926-1930), vicedirektoro de trusto "Orgenergo" kaj fine kiel universitata profesoro en la fako de interlingvistiko. Samtempe kun diversaj krom-funkcioj li intense estis okupita sur la scienca kampo de Esperanto kaj publikigis en kaj pri ĝi serion da



rimarkindaj verkoj. Agnosko por tio okazis en 1931, kiam li estis elektita akademiano.

Alia karaktera kvalito ĉe Drezen estis lia natura, denaska gvidanteco. Ne necesas priskribi tian tipon de homo, kiu kvazaŭ per si mem okupas la estrecon en grupo. Li krome posedis diplomation kaj ĝustan manon por taktiko, neniam urse ofendis kontraŭulojn, sed senbrue ŝovis kaj reŝovis siajn ŝakpecojn por atingi la maton; eĉ ne rifuzis plej drastajn metodojn por devigi iun aŭ por atingi ion. Pro tio li estis

Membroj de la Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio (ĉ. la jaro 1924), de maldekstre: Garaŝin, Ivanov, Nekrasov (staranta), Drezen, Valentinov kaj de ni neidentigita soveta esperantisto.

neŝatata gvidanto. Amikojn li apenaŭ konis; la moskvaj kamaradoj estimis, respektis kaj... timetis lin. Kunlaboro kun li estis ĉiam farĉetita per nefido, per singardemo. Certe en sia pozicio Drezen povis aŭtoritate kaj aŭtokrate agadi, kion Kalocsay trafe poezie prilumas:

*Drezen, la ruĝa-verda car'
Rigore regas en la SEU,
postulas, oni lin obeu
en ĉiu pens' kaj ĉiu far'.*

Jam en 1910 gvidanto de la peterburga Esperanto-grupo "Espero" kaj ekde ĝia fondo en 1921 daŭre prezidanto de SEU, li okupis la adekvatan lokon inter la soveta esperantistaro. Neracia, nekaptebla estis lia amo al la Internacia Lingvo. Li ne povis lasi ĝin. Por plensanga bolŝevisto tio ne estis rekomendo. Raciecon oni bezonis por la entreprenoj en la nova ŝtato; por poezio aŭ idealista penado, por iu internacia lingvo ne troviĝis loko. Tamen la lasta ne estis subpremebla ĉe Drezen. La sentoj por Esperanto restos en la makabra procesperiodo de la tridekaj jaroj. Tiu — por kompartiano — tendeno de Aĥilo kondukos ankaŭ lin en 1937 al stalina ekstermejo, kie li pereos.

E. Borsboom

Kalendario

Aŭgusto

- 03-08 3a Ornitologia semajnduono de ORE, Westerland-Sylt, FR Germanio
- 03-09 47a Kongreso de SAT, Bergamo, Italio
- 03-10 30a Internacia Junulara Konferenco de TEJO, Münster, FR Germanio.
- 04-11 Oficiala Postkongreso, Kronach, FRG
- 04-11 20a Int. Esperanto-ferisemajno, Krommenie, Nederlando
- 04-14 Internacia turista renkontiĝo, Szeged, Hung.
- 04-25 Someraj Universitataj Kursoj, Dua Sesio, Lieĝo, Belgio
- 05-12 Vegetarana kongreso, Dudince, Ĉeĥoslovakio
- 05-24 Internaciaj kursoj por instruistoj, Burgas, Bulg.
- 10-17 Somera Esperanto-kurso, Barlaston, Britio
- 11-24 Internacia pedagogia seminario, Burgas, Bulg.
- 17-31 Esperantista grupovojaĝo tra Albanio
- 19-24 Varia internacia semajno, Budapeŝto, Hung.

Septembro

- 05-18 Ora Pola Aŭtuno, Miedzygórze, Pollando
- 06-08 5a Jubilea renkontiĝo de esperantistoj-filatelistoj, Opava, Ĉeĥoslovakio
- 06-08 Amika renkontiĝo, Dudince, Ĉeĥoslovakio

- 07-08 16a Kataluna renkontiĝo, Cervera, Hispanio
- 14-19 45a Itala Esperanto-Kongreso, Verona
- 14-25 Ora feriado, Pamporovo, Bulgario
- 18-28 Ĉebalta kultura seminario, Kadyny, Poll.
- 18-28 Internaciaj junularaj ferioj, Gdańsk kaj Kadyny, Pollando
- 21-22 7a Kultura semajnfino, Renens, Svislando
- 22-28 15a Eŭropa feriosemajno, Magliaso, Svislando

Oktobro

- 06-15 7a Pupteatra Internacia Festivalo, Zagreb, Jugoslavio
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Novembro

- 02-03 Kultura semajnfino, Lugano, Svislando
- 03-04 61a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, Kitakyusyu, Japanio

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- 15 Tago de la Esperanto-libro
- 29-03/1 4a Vintra feriado, Budapeŝto, Hungario
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

Verko por fieri

Recenzas Rudolf Rychlý (Ĉeĥoslovakio):

Manlibro pri transporto de fluidaĵoj (likvaĵoj kaj gasoj), de J. Manceau, Rotterdam: la aŭtoro, dua eldono 1973. 251p. 22cm. Kserografiita.

La aŭtoro verŝajne celis nek alt-sciencan, nek teknike pintan verkon, sed modernan, praktike uzeblan manlibron, kiu entenu la lastajn industriajn akirojn, laboratoriajn eltrovojn kaj ĵusajn nekonfirmitajn industriajn eksperimentojn pri la transporto de likvaĵoj kaj gasoj. Ankaŭ multaj praktikaj ekzemploj (nomogramoj, bildoj) konfirmas tion.

La manlibro estas por E-teknikistoj fonto de terminoj, ĉar la verko pritraktas ĝeneralan hidrodinamikon, funkciadon de impulsaj kaj volumenaj pumpiloj kaj impulsaj gasmaŝinoj, pritubajn streĉfortojn, teknologion (inkluzive de rimarkoj pri korodado), tubajn kondukilojn, valvologion, maŝinojn kaj mezurilojn. Oni devas admiri la laboron de la aŭtoro; la verko estas bone komparebla kun similaj nacilingvaj manlibroj, ofte eĉ pli detala ol ili.

Mendu ĉe UEA: 18,70 (por Nederlando 19,45) gld. plus sendokostoj 10%.

Plia riĉiĝo

Recenzas D.B. Gregor (Britio):

Katolika terminaro (Esperanto-English), de G.N. Pausback. Tilburg, Nederlando: Internacia Katolika Informejo, 1974. 60p. 21cm.

Daŭre fekunda je terminaroj, la teologia fako nun pliriĉiĝis per ĉi tiu traduko de la *Katolika terminaro Esperanto-latina* de 1968. Supozeble brita recenzanto devus limigi sin al kontrolado de la anglaj terminoj. Ĉi tie, konsultinte pastron en kazoj de dubo, mi povas deklari la liston senerara.

Profitante de la restanta spaco, mi rimarkigas: (i) vortojn, kiuj ne troviĝas en PIV: *amikto*, *anamnezo*, *deŭterokanona*, *devocio*, *dispensi*, *institui*, *klaŭzuro*, *kvadra-* (*k.c.*) *gesimo*, *maniplo*, *religia*, (porpledita en Kat. Term. por Jap. n-ro 18), *sakramentalo*, *traktuo*, *riĝilo*; (ii) signifojn ne notitajn en PIV: *abako* (kial ne *kredenco*?), *ampolo*, *bisi*, *dekan-* (*k.c.*) *ujo*, *estradoj*, *Fortoj*, *hostiingo*, *kapitulo* (kp. KTJ n-ro 35), *Kompletoj* (Wells *postvespraj preĝoj*), *krismi*, *lektoro*, *oficanto*, *postulanto*, *sanktproklami* (W. *enkanonigi*), *ŝultrovesto* (kial ne *skapulario*?), *versaĵo* ("versicle"); (iii) ne-PIV-aĵojn: *akcidento* (-co), *koncilo* (-io), *Gregorakanto* (-ia ĉanto), *ikonstaraĵo* (-ostazo), *Jehudujo* (-do),

kasublo (z), *mosaraba* (z), *primato* (s); (iv) homonimojn: *oblat(in)o*, *oratorio* (W. *kapeleto*); (v) dubindaĵojn: *mortideva* (-ema), *predikseĝo* (W. -ejo), *prelegilo* (W. *legpupitro*), *Regadoj* (Koloss. 2, *estrecoj*), *tombotuko* (W. *morto-*), *Eklezio batalanta* (KTJ *Ekl. militanta*), *baltoto* (kial ne *katekumeno*, per kiu oni evitus *baptota meso*?); (vi) erarojn: *komunii* ntr., *Loretto* (-to).

Sprito mezdoza

Recenzas E. Lapenna (Jugoslavio):

15 Komedietoj, de Robert Mackay. Londono. Brita Esperanto-Asocio, 1974. 82p. 21cm.

Laŭ neskribitaj reguloj de nia recenzo-verkado, mi devus unue konstati, ke la 15 komedietoj estas "senpretendaj". Ĉar, onidire, senpretenda estas ĉio ne mencianta figurojn el mitologio kaj ne lamentanta pro la homara sorto ekde antikvaj faraonoj ĝis Hitler. Tamen la 15 komedietoj estas pretendaj, pretendaj rilate la taskon, kiun la prezentinto de la verko Raif Markarian klarigas en sia antaŭparolo. La komedietoj estas destinitaj por societaj programoj, por amatoraj aktoroj, rekrutitaj el la vicoj de propraj membroj kaj por scenejo sur pargetoj de la propra kunvenejo. Rilate tiun postulon la aŭtoro sukcesis. Plimulto de la teatraĵoj estas mallongaj, roluloj nur kelkaj, sceneja aranĝo simpla. Sed ne ĉie. Ekzemple, grandan ŝvitpenon kaŭzus al amatora grupo improvizo de "kirurgejo de dentisto" kun dentista seĝo! Krome, ĝuste tiu dentista komedieto plej suferas de vorta superfluo rezultiganta nekomprenon. La komedietoj longas jen unu — pli-malpli dialogigitaj anekdotoj — jen pli ol dek paĝojn ("Vizaĝo kontraŭ Karno"). "Vizaĝo" kaj "Karno" estas nomoj. La aŭtoro tre klopodis enmeti humuron, jam antaŭ komenciĝo de la teksto, en nomojn: Menso Gulo, Vaga Bondo, s-ino Balono, s-ro Kapaĉo, s-ro Muskolo. Kelkaj pecoj, la plej mallongaj, estas la plej ridigaj, ekz. "Bonan sanon", satireto pafanta la homan malobjektivecon kaj "Kontenta kliento" priridanta stultajn komercistojn, sed en "Stanlio-Olio"-stilo. Cetere, ne serĉu en tiuj komedietoj la spriton de Molière kaj satirpikojn de Shaw. Tion ili ne enhavas. Sed la komunikecon de la fluanta lingvo kaj mezdozon de sprito, tion ili enhavas, sed, bedaŭrinde, ankaŭ preserarojn, precipe ĝena trovitaĵo en teatraj tekstoj. Nepre la komedietoj plenumas la intencon de la aŭtoro; ĉu tio apartenas al pretendo — restas malfermita demando.

Mendu ĉe UEA: 4,20 (por Nederlando 4,37) gld. plus sendokostoj 10%.

Poezia gusto de la aktoro

Recenzas Roger Bernard (Francio):

Nikolaj Rytjkov — Elektitaj eroj (gramofondisko). Sono: P. Schilperoord. Redaktis: Reto Rossetti. Londono: Grupo Kvin, 1974. Monofona, 33 t/m, 30cm. Al tiuj, kiuj havis la okazon koni Nikolaj Rytjkov persone, aŭ tra liaj recitaloj, la disko de kelkaj liaj “elektitaj eroj” devos multe plaĉi. Kvankam la sonoj ne estas tute perfektaj, ĉar elprenitaj verŝajne dum tiuj recitaloj per magnetofonoj de amatoroj, ni tuj rekonas kaj ĝuas la sonorajn rusmelodian voĉojn de la malaperinto: li kvazaŭ ne tute malaperis. Mortintaj verkistoj aliras nin per siaj *presitaj* pensoj. Aktoroj, sur diskoj, redonas iom el sia korpo, la voĉon, kun ĉiuj ĝiaj modulacioj — esprimoj de la artistaj emocioj. La elekto de liaj eroj (farita de R. Rossetti) trafas montras la gustojn de Rytjkov: vera poeziamanto, lia admiro estis la plej granda por Kalocsay. Sed li ŝatis multe ankaŭ aliajn, ekz. Auld, Boulton, Kurzens, Rossetti. Du pecoj, elektitaj el la verkoj de Shakespeare, donas al li la okazon elvolvi sian ardan temperamenton, kiun kelkaj neslavaj amikoj liaj kelkfoje juĝis iom tro patosa. Sed Rytjkov sen tia entuziasmo, parto de lia ĉarmo, ne estus Rytjkov. Kaj unu komika rakonto de rusa soldato (pri la enhejma edzino) elokvente pruvigas la diversan aspekton de lia talento, kaj mi persone bedaŭras, ke li ne pli multe aktoris ankaŭ en pli “minoraj” ĝenroj. Troviĝas ankaŭ du pecoj el rusaj aŭtoroj. La kortuŝa enkonduko de Marjorie Boulton sur la diskokoverto iom rememorigas pri lia turmentoplena vivo, pri kio li cetere tro mallonge parolas en la unua peco. Kaj la disko entute estu nemalhavebla por tiuj, kiuj amis lin kaj amas poezion.

Mendu ĉe UEA: 15,— (por Nederlando 17,40) gld. plus sendokostoj 10%.

Modeste interesa

Recenzas Richard M. Cash (Parizo):

G. Marin vizitas sian hejmon — la mondon, de Gaspard Marin. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1974. 80p. 17cm.

Ĉi tiu modeste interesa libro komenciĝas per kvazaŭ-biografio de esperantisto Gaspard Marin, “modestulo kaj honestulo, pacifisto, amiko de infanoj kaj simpluloj, vegetarano, nefumanto”. Ni plue konatiĝas kun li pere de mallongaj ĉerpaĵoj el lia taglibro, kiu priskribas liajn vagadojn tra Eŭropo kaj Azio dum dek jaroj. Poste al ni prezentiĝas dudeko da folioj el “karta enciklopedio”, t.e. serio de bildkarto kun kulturhistoriaj priskriboj, kiuj montras morojn, kutimojn,

kaj ilarojn de diversaj popoloj tra la mondo kaj tra la epokoj.

Temas pri kuriozaĵo, kiu tamen ne estas sen propra intereseco, almenaŭ tiom ke ĝi malfermas al ni la koron de fervora kosmopolito. Ĝi estas leginda, se oni ne havas ion pli gravan farenda, kaj ĝiaj foje kuriozaj faktoj ne povas malutili.

Ĝia lingvaĵo estas sufiĉe viva kaj flua, sed troviĝas atentendaj malglataĵoj, kiuj libere miksiĝas kun la tro multaj preleroj. Sed la “karta enciklopedio” tre bone uzeblas en mezgrada kurso pro siaj mallongeco kaj lingva simpleco, kondiĉe ke ĝi estu kontrolita de kompetentulo lingva.

Mendu ĉe UEA: 3,— (por Nederlando 3,20) gld. plus sendokostoj 10%.



Anni kaj Montmartre (1930) R. Schwartz (1894-1973). 126p. 20cm. Broŝ. 8,10 gld. Fotorepreso 1974 de tre ŝatata romano originala.

Ĉu vi deziras korespondi? (fotorepreso 1974) M. Noll (1874-?) 16p. 14cm. Broŝ. 1,20 gld. Konsiloj por korespondemuloj, kun utilaj frazoj kaj esprimoj.

Dek kvin komedietoj (1974) R. MacKay. 82p. 20cm. Broŝ. 4,20 gld. Kolekto de facile prezenteblaj komedietoj por kursfino aŭ klubvespero.

Elfosadaj trovaĵoj el la distrikto Wedding de Berlin (1974) G. Wettstädt. 68p. 21cm. Broŝ. 7,50 gld. Abunde ilustrita raporto pri elfosado farita en 1973, kun resumo en Esperanto, germana, franca kaj angla lingvoj.

Esperanta-rusa vortaro (1974) E.A. Bokarev (1904-1971). 488p. 17cm. Bind. 4,50 gld. Unudirekta vortaro preskaŭ 26 000-vorta, kun koncizaj notoj pri la gramatiko de la Internacia Lingvo.

59a Universala Kongreso de Esperanto: Kongresa Libro (1974) 128p. Ilus. 21cm. Broŝ. 5,— gld.

Konsideroj (1974) J. Haazen. 27p. 27cm. Broŝ. 3,30 gld. Publika letero pri la organizo kaj perspektivoj de la Esperantomovado, verkita por la 58a Brita Kongreso.

Kvindek jaroj de Esperanto en Oomoto (1973) E. Ito, N. Esumi, T. Nakamura. 90p. 21cm. Broŝ. 6,— gld. Laŭjara kroniko de la ligoj de Oomoto kun Esperanto.

Roseroj (1974) R. van Dalsem. 47p. 20cm. Broŝ. 5,40 gld. 12 novaj kantoj kun akompano.

Sepa Nokto, La (1968) L. Mňačko. El la nederlanda trad. A. Kooij-van Holst (1974). 131p. 30cm. Ringe broŝ. 6,60 gld. Memoroj el sep tagnoktoj en Prago, printempo 1968.

Universitata lernolibro de Esperanto (1973) T. Gim. 174p. 21cm. Broŝ. 8,10 gld. Tute en Esperanto, ĉi tiu libro verkita por kursoj en Koreujo taŭgas ankaŭ por aliaj landoj.

Vojo al Nirvano, La, aŭ la Dhammapado El la palia tradukis T.T. Anuruddha (1973). 94p. 20cm. Broŝ. 2,70 gld. Klasika teksto de Budhismo, kun enkonduko kaj klarigaj notoj.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

Perua renaskiĝo

KOMENCE DE JUNIO venis al ni entuziasma letero el Limo, la ĉefurbo de Peruo, anoncanta la fondiĝon de Junulara Esperanto-Ligo de Peruo kun 25 aktivaj membroj. JELP, kiel oni, verŝajne, kun juneca petolemo estonte referencos al la nova organizaĵo, jam petis informojn kiel aliĝi al TEJO kaj kiel aboni ĝiajn periodaĵojn.

Malgraŭ la fakto, ke la Esperanto-movado en Peruo notis brilajn sukcesojn en la unuaj du jardekoj de nia jarcento (en 1901 la unua lernolibro, en 1903 la fondiĝo de Societo por propagando de Esperanto kaj ekapero de Esperanta-hispana revuo), dum la lastaj jardekoj oni malmulton aŭdis pri la Movado en tiu lando. Aliloke en ĉi tiu numero de nia revuo (laŭlanda membro-statistiko por 1973) vi povas konstati, ke fine de la pasinta jaro UEA havis en Peruo dek individuajn membrojn. Tamen, ne estas konate, ke oni lastatempe faris aliajn provojn revivigi la organizitan Movadon en tiu sudamerika lando. Tial la fondiĝo de JELP eble havos historian signifon, ĉar el ĝi poste povus kreski ankaŭ landa asocio de UEA.


Kvankam la menciita letero tion ne diras, estas sendube, ke la nova organizaĵo bonvenigus ĉiaspecajn hispanlingvajn informajn materialojn kaj lernilojn pri la Internacia Lingvo. La adreso de JELP estas: Casilla 697, Correo Central, Lima, Peruo.

JEB kaj JEN ekviglas

JUNULARO Esperantista Brita (JEB), kiu lastatempe letargiis, denove montras vivsignojn. Antaŭ nelonge ĝi organizis junularan renkontiĝon en Bangor (Kimrio), dum kiu oni diskutis lingvajn problemojn de naciaj minoritatoj. La debatojn gvidis s-ro Hilary Chapman, la nova prezidanto de la landa sekcio de TEJO en Britio. Eble oni baldaŭ povos legi eĉ novan numeron de *Kial ne?*, renoma periodaĵo de JEB.

IJK sen vi ?

Dum monatoj ni logis vin al Münster (sur la apuda foto), kie inter la 3a kaj 10a de aŭgusto okazos la 30a IJK de TEJO. Nun, se vi jam ne estas inter la 230 aliĝintoj, — nenio helpas: LKK informas, ke ĉiuj lokoj estas okupitaj. Oni ja certe ankoraŭ povas aliĝi, sed LKK ne povas certigi loĝlokon, kion oni mem klopodu solvi.



Laŭ *ELNA Newsletter*, eldonaĵo de la usona landa asocio de UEA, ankaŭ la sekcio de TEJO en tiu lando — Junularo Esperantista por Nord-Ameriko (JEN) — reaktiviĝas post longa dormo. Oni havas definitivajn planojn por revivigi ankaŭ la periodaĵon de la junulara sekcio de ELNA, kies nomo — JEN - Bulteno — estas bone konata en la junularaj rondoj. La nova redaktoro de la periodaĵo estas s-ro Mark Mandel, 1275 University Avenue, Berkeley, CA 94701.

Ideologia pozicio de TEJO — diskutota

LA TAGORDO por la kunsidoj de la Komitato de TEJO, okazontaj dum la 30a Internacia Junulara Konferenco en Münster, enhavas preskaŭ dudek erojn. Krom la kutimaj ĉiujaraj punktoj, al kio devigas ankaŭ la fakto, ke TEJO ĉiujare elektas novan estraron kaj novan prezidanton, la tagordo enhavas ankaŭ du aparte interesajn erojn. Unu el ili traktos la laborplanon pri la agado de TEJO dum la sekvantaj jaroj, kaj la alia estos dediĉita al “ideologia pozicio de TEJO” (kiel notite en la tagordo dissendita al la komitatanoj). Almenaŭ la titoloj de tiuj du eroj sugestas, ke en Münster okazos interesaj diskutoj, pri kiuj ni raportos en nia septembra numero.

Ĉu vi parolas tendare ?

DENOVE estas havebla la populara lernolibro por la labortendaroj, kiun, laŭ materialoj de Hans Bakker (filo), verkis d-ro Renato Corsetti kaj Mauro La Torre. La preskaŭ 100-paĝa lernilo, aprobita de la Kontrolkomisiono de Lernolibroj de UEA, ĵus aperis en sia dua reviziita eldono. Dum la unua eldono, aperinta nur en 500 ekzempleroj, havis modestan aspekton, ne tre taŭgan por tendara uzo, la mil ekzempleroj de la nova eldono estas provizitaj per fortika kaj plaĉa kartona kovrilo. Krome, estas aldonitaj 25 paĝoj de konversaciaj tekstoj, kiujn ne enhavis la unua eldono. La novan eldonon de *Ĉu vi parolas tendare?* prizorgis UEA, subvencianta ĝin el sia Eldona Fondaĵo, tiel, ke la prezo restu malalta: 2,50 (por Nederl. 2,60) gld.



Kongresa Komunikilo

59-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 - 08 03

Alta Protektanto: Helmut Rohde, Ministro pri Klerigo kaj Scienco de FR Germanio.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80.

Nova ministro: nova Alta Protektanto

Sekve al la jam anoncitaj ŝanĝoj en la registaro de FR Germanio, la nova Federacia Ministro pri Klerigo kaj Scienco, Helmut Rohde, transprenis de sia antaŭulo la Altan Protektantecon de la 59a Universala Kongreso.

La Kanceliero salutas

En la ĵus aperinta, informplena Kongresa Libro aperas speciala salutmesaĝo ankaŭ de la nova Federacia Kanceliero de FRG, s-ro Helmut Schmidt. La Kanceliero skribis interalie: "Mi mem kiel politikisto opinias speciale grava tasko konvinki la homojn — ne nur en ĉi tiu lando — pri la neceso de komuna internacie valida lingvo".

Multaj registaroj reprezentiĝos

Kvankam la listo ankoraŭ ne estas kompleta, almenaŭ 14 ŝtatoj jam anoncis sian intencon reprezentiĝi en la Kongreso, kaj multaj el ili oficiale salutos en la Inaŭguro. Tio malgraŭ la fakto, ke en Hamburgo mem ne troviĝas ambasadoj.

Dektri-membra Honora Komitato

En la Honora Komitato por Hamburgo troviĝas 13 elstaraj figuroj de la publika vivo, inter kiuj federaciaj ministro kaj eksministro, pluraj prezidantoj de hamburgaj ministerioj, kaj la direktoro de la Unesko-Instituto por Pedagogio, kiu havas sian sidejon en la kongresa urbo.

Libroj por ĉiuj gustoj

Kongresanoj serĉantaj legaĵon por la reveturo post la Kongreso trovos vastan elekton el la Esperanto-literaturo ĉe la libroservo en la kongresejo. Prizorgos ĝin la konata eldonejo-libroservo Pickel el Nürnberg. Inter alie, tie estos rigardebla bindita modelo de la nun presata verkego de CED *Esperanto en perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*.



Margaret Hill kunportos ankaŭ al Hamburgo sian gitaron kaj en la Internacia Arta Vespero prezentos novan bukedon da ne-kontinentaj eŭropaj kantoj.

Pliaj infanoj estas bonvenaj!

Kvankam aliĝis ĝis nun nur 14 infanoj al la 14a Internacia Infana Kongreseto en la hamburga antaŭurbo Hoisbüttel, la okazigo de la Kongreseto estas jam certigita kaj la kondiĉoj tie estas tre favoraj. Hezitantaj gepatroj bonvolu do ankoraŭ decidiĝi pri partoprenigo de siaj infanoj en tiu unika aranĝo. Korespondadreso: S-ino E. Blasius, D-2 Hamburg 70, Grenznick 7.

Preskaŭ 1 600 kongresanoj

Ĝis la 10a de julio aliĝis entute preskaŭ 1600 personoj el kvindeko da landoj, krom pli ol 100 aliaj, kiuj anoncis la intencon aliĝi surloke. Kvankam la Kongreso ne estos rekorde granda, la partopreno estas tre internacia, kun pli da landoj reprezentitaj ol kutime.

Postkongreso kreskas

Ĝis la fino de junio jam aliĝis 92 personoj el 16 landoj al la Postkongreso de Esperanto en la pitoreska urbo Kronach, FRG. La organizantoj emfazas, ke ankoraŭ disponeblas multaj litoj je malpli ol 5,— germanaj markoj por ĉiu nokto.

Filipinoj

• Laŭ informo de s-ro D.M. Brink, delegito de UEA en Hongkongo, jam antaŭ kelkaj monatoj, en la ĉefurbo de la lando fondiĝis Esperanto-Ligo de Manilo, kun ĉ. 50 entuziasmaj lernantoj de la Internacia Lingvo. S-ro Julian Burgos venis al Hongkongo, komisie de la Ligo, aĉetis ĉiujn disponeblajn kaj mendis pliajn informajn materialojn kaj lernilojn de Esperanto. La nova organizaĵo luprenis apartan domon en Manilo kaj tie okazigas ĉiutagajn Esperanto-kursojn. Adreso de la Ligo estas: P.O. Box 2093, Manila, Filipinoj.

Francio

• En la unua duono de ĉi tiu jaro, en norda Francio okazis pluraj ekspozicioj pri la Internacia Lingvo kaj temoj ligitaj al ĝi. La inaŭgurojn de tiuj aranĝoj, kiuj plej ofte okazis en la lokaj urbodomoj, regule ĉeestis urbestroj, deputitoj kaj aliaj eminentuloj de la loka vivo. Ankaŭ la loka gazetaro amplekse kaj favore raportis pri la aranĝoj.

Ĉinio

• Ekde la 1-a de julio 1974 ĉesis funkcii la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo. Ĉiujn ĝiajn laborojn transprenis Guozi Shudian (Centro de ĉinaj eldonaĵoj), kiu tiucele fondis sian Esperanto-sekcion, konservante la ĝisnunan adreson de la Libroservo de ĈEL (Poŝtkesto 313). Estas malfacile juĝi kion ĉio ĉi signifas, sed oni eventuale povas eĉ esperi, ke ĈEL estonte okupiĝos pri la disvastiĝo de la Internacia Lingvo en Ĉinio.

FR Germanio

• D-ro Richard E. Wood (Usono) prelegis en la Filozofia Fakultato de la Universitato de Sarlando, Saarbrücken (FR Germanio). La prelego de la nova redaktoro de *LMLP* okazis la 21an de junio ĉi-jare, en la kadro de la kurso de s-ro Reinhard Haupenthal, docento ŝargita pri esperantologio ĉe la sama universitato. D-ro Max Mangold, tiea profesoro pri fonetiko "protektis" la prelegaranĝon, kies temo estis "La aktuala stato de interlingvistiko kaj esperantologio en usonaj universitatoj". D-ro Wood parolis en la Internacia Lingvo.

Nederlando

• Sekve de rolo en la televida seria filmo "De stille kracht" (La mistera forto), kiun la nederlanda televido elsendis antaŭ kelka tempo, s-ino Jenny Heetkamp - Senstius (sur la



foto) havis plurajn intervjuojn en la nederlandaj televido, radio kaj gazetaro. Estante aktiva uzanto de la Internacia Lingvo, la populara aktorino en ĉiuj ĉi intervjuoj menciis Esperanton kaj sian aktivecon en la Movado. Tiuj mencioj rezultigis plurajn preleginvitojn, informpetojn kaj inviton gvidi Esperanto-kurson en virina societo en Hago.



S-ro L.M.Hernández, la ĉefdelegito de UEA por Hispanio, estas samtempe ankaŭ la direktoro de la nova Hispana Esperanto-Muzeo, solene inaŭgurita la 12an de junio ĉi-jare. En la biblioteko de la Muzeo (sur la supra foto) troviĝas kelkaj miloj da libroj, preskaŭ du mil jarkolektoj de periodaĵoj kaj miloj da aliaj ekspoziciaĵoj. Unu ĉambro servas kiel oficejo de la direktoro.

Portugaliao

• Laŭ informoj ricevataj de la ĉefdelegito de UEA en Portugaliao s-ro António da Silva Almeida, kiu antaŭ nelonge kun sia edzino vizitis la Centran Oficejon, la Movado en Portugaliao lastatempe montras signojn de vigliĝo (pri kio ni esperas pli amplekse raporti en unu el la proksimaj numeroj de nia revuo). Tamen, jam meze de majo, en Montemor-O-Novo, en la sudo de la lando, okazis renkontiĝo kun pli ol cent partoprenintoj. Dum la renkontiĝo oni, interalie, diskutis la okazigon de la Unua (!?) Portugala Kongreso de Esperanto, en junio 1975.

Hungario

• La Budapeŝta teritoria komitato de HEA organizis la partoprenon de la ĉefurbaj geesperantistoj en la sole na defilo okaze de la Unua de Majo, la internacia festotago de la laboro. La defilon, dum kiu oni portis sloganrubandojn pri la Internacia Lingvo, partoprenis pli ol cent geesperantistoj.

Jugoslavio

• Al la Esperanto-societo Bjelovar (Kroatio), komence de majo ĉi-jare, estis aljuĝita kaj solene transdonita la jara urbo-premio por rekoni la sukcesan aktivecon de la Societo kaj ĝian kontribuon al la kultura vivo de la urbo. La Societo estas vaste konata ankaŭ ekster la limoj de Jugoslavio pro sia periodaĵo *Juna ambasadoro*.

Geologio

• Dum la simpozio “Internacia lingvo kaj geologio”, okazinta komence de majo 1974 en Varsovio, estis prezentitaj 19 referaĵoj kaj komunikoj, kiujn oni intencas eldoni kiel 3an volumon de *Geologio internacia*. La nova sekcio de ISAE elektis en Varsovio ankaŭ sian estraron, kiun prezidas d-ro Vlastislav Zázvorka, direktoro de la Nacia Muzeo en Prago. Honora prezidanto de la Geologia sekcio de ISAE fariĝis André Cailleux, profesoro pri sedimentologio kaj geomorfologio en la universitatoj de Sorbonne kaj Laval (Francio) kaj direktoro de Centre d’Etudes Nordiques en Kebeko (Kanado).

Historio

• En julio ĉi-jare aperos japanlingva verko de Oosima yosio kaj Miyamoto masao *Historio de kontraŭregima Esperanto-movado*. La verko, kiu en 6000 ekzempleroj aperos ĉe la renomata eldonejo Sanseido, traktas la engaĝitan Movadon en Japanio.

Universitatoj

• En la universitata urbo Valenĉa, apud Rio de Janeiro en Brazilo, antaŭ nelonge komenciĝis kurso de la Internacia Lingvo. La kurso, kiun gvidas s-ro Carlos Lima Melo, allogis 200 gestudentojn kaj profesorojn de la loka universitato.

Feriado

• “Ora Pola Aŭtuno” estas dusemajna feria aranĝo en Międzygórze (Pollando), kiu okazos la dekan fojon ĉi-jare inter la 5a kaj la 18a de septembro. Oni kalkulas, ke la ĝisnunajn aranĝojn en Międzygórze partoprenis entute pli ol 2 300 feriantoj el 22 landoj, kio per si mem emfazas la popularecon de “Ora Pola Aŭtuno”.

Muzeoj

• En la 10a Ĝenerala Asembleo de Internacia Konsilantaro de Muzeoj, okazinta komence de junio en Kopenhago, partoprenis ankaŭ du konataj esperantistoj: s-ro Tibor Sekelj (Jugoslavio) kaj s-ro Yoshimi Umeda (Japanio). Ili ambaŭ havis plurajn kontaktojn kun kopenhagaj es-

perantistoj, kaj s-ro Sekelj ankaŭ prelegis en la Kopenhaga Esperanto-Klubo pri “Vojaĝo tra la ŝtonepoko de Nov-Gvineo”.

Korespondado

• Du gravaj brazilaj gazetoj — *Jornal do Brasil* (Av. Brasil 500, Rio de Janeiro) kaj *O Globo* (Rua Irinsu Marinho 35, Rio de Janeiro) — volonte kaj senpage publikigas anoncetojn pri korespondado kun brazilanoj ankaŭ en la Internacia Lingvo.

Kongresoj

• Inter la 14a kaj la 19a de septembro ĉi-jare, ĉe la Universitato de Verona okazos la 45a Itala Esperanto-Kongreso, kies ĉeftemo estos “La eduka valoro de Esperanto por la formiĝo de internaciisma konscien-

co”. Jam nun estas konfirmite, ke al la inaŭguro de la Kongreso venos ministro de la itala registraro. Kiel kutime, eksterlandaj partoprenantoj de la Kongreso ne pagas aliĝkotizon.

Gramofondiskoj

• S-ro Georgo Szüllög el Budapeŝto, dumviva membro de UEA, havas verŝajne la plej kompletan kolekton de Esperantaj gramofondiskoj. Kiel li mem skribis al ni, en lia diskoteko troviĝas 101 gramofondiskoj en Esperanto, originantaj el 21 landoj.

Kulturaj aranĝoj

• Aŭstria Esperantista Federacio, la landa asocio de UEA, jam plurajn jarojn praktikas specifan aktivecon aranĝante kulturajn vesperojn dediĉitajn al unuopaj landoj kaj popoloj. Ĉion ĉi oni faras kunlabore kun tiulandaj kulturaj institucioj, funkciantaj en Vieno. Ankaŭ ĉi-jare okazis almenaŭ tri tiaj aranĝoj (aŭstralia, bulgara kaj pola) kaj ĉiuj tri bone sukcesis.

Persone

Albault

• La prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto d-ro André Albault festis antaŭ nelonge sian 35-jaran aktivecon en la Esperanto-movado.



Kiel direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, d-ro Albault nun finverkas *Vojaĝo tra la landoj*, kiun li mem priskribas kiel “scienca studo, historia kaj lingva, pri la landnomoj en Esperanto”. Krome, en la Akademio li preparas oficialan aldonon al la *Universala Vortaro*.

Starr

• Mark Starr, kiu fine de aprilo fariĝis 80-jara, restas ankaŭ nun unu el la plej aktivaj esperantistoj en Usono. Okaze de sia jubileo, s-ro Starr, kiu estas vaste konata en Usono pro siaj elstaraj funkcioj en la tieaj sindikata kaj instruista medioj kaj pro siaj multnombraj verkoj, estis plurfoje intervjuita por multaj ĵurnaloj, radio kaj televido. Kaj — simile al lia riĉa vivo — ankaŭ en tiuj intervjuoj Esperanto okupis elstaran lokon.

Collinder

• Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, prof. d-ro Björn Collinder, emerita profesoro pri finugraj lingvoj en la Universitato de Uppsala (Svedio), festos la 22an de julio ĉi-jare sian 80an datrevenon. Prof. Collinder, kiu, kiel unu el la plej grandaj sciencaj aŭtoritatoj en sia fako, lekcias ankaŭ en Vieno, Los Angeles, Minneapolis, Canbera kaj aliloke, estas unu el la plej valoraj apogantoj de la Internacia Lingvo en la sciencaj lingvistikaj rondoj. Li mem aktive partoprenis la Movadon kaj publikigis verkojn en kaj pri la Internacia Lingvo, kiu regule ĉeestis ankaŭ en liaj nacilingvaj verkoj.

N-ro 480, 1974-05-31

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

BRAZILLO: Hyzzo Gondeberto dos Santos. KUBO: Pedro Pablo Lamas Díaz.

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1974

BRAZ: 211 Antonio Eduardo da Costa Pereira. BRIT: 212 A.D. Craven. FRANC: 213 Roger Bernard. ISR: 214 Henia Waksman. KAN: 215 J. Courtney White. MEKS: 216 Hector Vázquez Briones. SVED: 217 Dag Ellard, 218 Gävle Esperantoförening, 219 Clas Holmberg. USO: 220 Edward Schultz.

NOVAJ DELEGITOJ

(Se ĝis la dato 1974-09-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomigo fariĝos valida).

BELG: Jan Bovendeerd, FD Mortsel. ĈEĤOSL: Vláša Hasala, D, JD kaj

FD Mutěnice. FRANC: J. Decobert, FD Accous kaj Oloron; F. Mesplède, D Arcachon; A.G. Dumont, FD Miers. FRG: Klemens Lamby, D Kettwig, D kaj FD Mülheim. HUNG: Ernő Kőnczöl, D kaj FD Eger. ISR: Uzi Sela, D kaj FD Kirjar-Ata. KAN: Jean Forgeau, D kaj FD Hull. RUM: Jenő Zágoni, D Sfîntu Gheorghe. SVED: Harald Andersson, D kaj FD Hällefors. USONO: Mark A. Mandel, D kaj JD Berkeley; Nels Nelson, D kaj FD Bozeman; Lanna Cheng, FD La Jolla; Charles R.L. Power, D Millbrae kaj FD San Francisco.

NE PLU VALIDAS

AŬSTRALIO: Melbourne, FD ('Mensa' kaj rozkrucismo). ĈEĤOSL: Dubí u Teplic lázní; Veselí nad Moravou, FD (komerco). FRANC: Hyères, FD (filozofio, paco, SOS-aŭtoservo). FR GERM: Darmstadt; Ratzeburg. ITA:

Torino, FD (komerco). JUGOSLAV: Beograd, FD (komerco eksterlanda); FD (literaturo). NED: Den Haag, FD (turismo). RUM: Sfîntu Gheorghe, VD. SVED: Skåne Värsjö. US: Baton Rouge.

DONACOJ 1974 (Gld.)

ELDONA FONDAĴO: FR Germanio: Louis Beaucaire 16,—.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 3,53. Sumo ĝisnuna 7,46.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: Edwin Burg 2,50. Svedio: Erik Brenander 36,44; Ulla Luin 50,—. Usono: Esperanto-Societo de Portland (OR) 62,42. Sumo ĝisnuna 396,15.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO: Instituto Hodler 68 375,—.

ĜENERALA KASO: Danlando: E. J. Frost 2,05. Kanado: K. Crockett 100,—. Japanio: Oomoto 1 000,—. Sumo ĝisnuna 1 935,18.


PROPAGANDA KONTO: Meksikio: Héctor Vazques-Briones 4,96. Sumo ĝisnuna 560,96.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Laŭlanda membrostatistiko por 1973

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume
Acoroj	-	1	1	Indonezio	-	5	5	Nov-Zelando	191	102	293
Afriko Hispana	-	1	1	Irako	-	1	1	Pakistano	-	1	1
Albanio	-	1	1	Irano	-	2	2	Panamo	-	2	2
Antiloj Nederl.	-	1	1	Irlando	-	8	8	Peruo	-	10	10
Argentino	246	37	283	Islando	-	23	23	Pollando	3100	244	3344
Aŭstralio	300	214	514	Israelo	200	41	241	Porto-Riko	-	3	3
Aŭstrio	300	81	381	Italio	1000	287	1287	Portugalio	-	35	35
Belgio	500	200	700	Japanio	1000	289	1289	Reunio	-	1	1
Brazilo	103	265	368	Jugoslavio	1500	192	1692	Rodezio	-	2	2
Britio	814	546	1360	Kanado	204	100	304	Rŭando	-	1	1
Bulgario	5100	115	5215	Kenjo	-	2	2	Rumanio	-	40	40
Cipro	-	1	1	Kolombio	-	9	9	Saŭdi-Arabio	-	1	1
Ĉado	-	1	1	Koreo (Suda)	150	25	175	Senegalio	-	1	1
Ĉeĥoslovakio	1100	176	1276	Kosta-Riko	-	2	2	Sovet-Unio	-	140	140
Ĉilio	-	7	7	Kubo	-	30	30	Srilanko	-	2	2
Ĉinio	-	3	3	Libano	-	4	4	Sud-Afriko	30	29	59
Danlando	900	153	1053	Libio	-	1	1	Sudano	-	1	1
Egiptio	-	3	3	Luksemburgo	-	3	3	Svedio	1000	531	1531
Etiopio	-	1	1	Malagasa Resp.	25	6	31	Svislando	120	199	319
Finnlando	257	241	498	Malto	-	3	3	Tajlando	-	1	1
Francio	804	635	1439	Maŭricio	-	3	3	Tunisio	-	2	2
FR Germanio	1200	464	1664	Meksikio	-	25	25	Turkio	-	2	2
Germana DR	-	27	27	Monako	32	2	34	Urugvajo	25	7	32
Greklando	350	31	381	Mozambiko	-	3	3	Usono	100	625	725
Hindio	-	13	13	Nederlando	726	481	1207	Venezuelo	-	20	20
Hispanio	480	240	720	Niĝerio	-	2	2	Vjetnamio (Suda)	-	7	7
Hongkongo	-	1	1	Norvegio	432	88	520	Zairo	25	7	32
Hungario	3100	189	3289	Nov-Gvineo	-	1	1	ENTUTE:	2 5414	7302	32716

RIMARKO: En la supra tabelo AM estas mallongigo por la asociaj, kaj IM por la individuaj membroj de UEA.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabeio la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1973, Dua Parto, p.157. Mallongi-
goj: I = informoj; P = parolado; K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 31.45 m (9540 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45 m (9540 kHz), 31.01m (9675 kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48,90 m (6135 kHz). I.P.

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.38m (7250 kHz), 13.38 m (21705 kHz). I.P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
08.30-08.55 Sofio, 49.42 m (6070 kHz). P. Radio Sofia, Bulgario.
10.30-11.00 Muritiba, 190m (1580 kHz). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 47 m, 40m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 30m, 25 m. I.
20.00-20.20 Romo, 50.08 m (5990 kHz), 41.24m (7275 kHz), 30.90 m (9710 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.30 Sofio, 50.61 m (5928 kHz). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kHz) kaj Guarulhos, 205 m (1460 kHz), 90.23 m (3325 kHz). I.K. Sintezo de Esperanto, Caixa Postal 370, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
12.20-12.30 Berno, 75.28 m (3985 kHz), 48.66 m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.44 m (15430 kHz), 16,86m (17795 kHz), 13.94m (21520 kHz). P.(d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.
12.30-12.45 Gdańsk, 66.29 MHz

(mod. frekv.). Ripeto de la sabata programo el Varsovio unu fojon en la monato.

Marde

16.40-16.55 Bratislavo, 68.84 MHz, (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 MHz, 69.20 MHz, 69.50 MHz, 69.68 MHz. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakio.

Merkrede

12.20-12.30 Berno, kiel lunde (s-ro Gacond).
12.30-12.45 Vieno, 203 m (1475 kHz). P. (ĉiun kvaran sinsekvon merkredon).
20.45-21.00 Sabadell, 203 m (1475 kHz), 89.1 MHz (mod. frekv.). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

16.25-16.40 Bratislavo, kiel marde.
21.45-21.55 Berno, 75.28 m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 25,60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.44m (15430 kHz). P. (d-ro Baur).

Vendrede

18.00-18.30 Clermont-Ferrand, 90.4 MHz (mod. frekv.). K. Centre de Téléenseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.
20.00-20.30 Pekino, 43 m, 33 m, 31 m. I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264 m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Sabate

00.05-00.20 Varsovio, 1321 m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo kaj povas esti prokrastita ĝis 00.30.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74 m (6155

kHz), 16.87 m (17780 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.45-21.55 Berno, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).
22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

RADIO VARSOVIO krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 21.00h ĝis 21.30 h per ondoj 49 m, 41 m, 31 m; 2) dum la svedlingva programo marde de 15.00 h ĝis 15.30 h per ondoj 200 m, 49 m; 3) dum la danlingva programo dimanĉe de 20.00 h ĝis 20.30 h per ondoj 49 m, 41 m. La anguletoj estas kelkminutaj kaj pri-traktas ĉefe Esperanto-temojn.

USONO. Radio-kurso estas dissendata de diversaj lokaj stacioj (vidu la rubrikon en la numero de oktobro 1973).

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislavo (ankaŭ en eksterlandlimaj regionoj), Clermont-Ferrand, Gdańsk (M.F.), Muritiba, Sabadell;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Sofio, Valencio (en suda Eŭropo), Varsovio, Vieno (203 m, 48.74, 41.38 m), Zagrebo;

c) stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba-Guarulhos (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Vieno (16.87 m, 13.38 m) en sudorienta Azio;

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Berno (25.60m, 25.27m, 19.60m, 19.44 m, 16.86m, 13.94 m, 13.90 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebila laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

Nekrologoj

JAKOB STEFANČIĆ 1885-1974

Dojeno de la jugoslavia esperantistaro, elstara figuro en la jugoslavia Esperanto-movado, d-ro Jakob Stefančić, emerita advokato, aktiva partopreninto en tiulanda revolucia movado, forpasis fine de junio ĉi-jare en Beogrado. Li lernis la Internacian Lingvon jam en 1912, sed aktiviĝis nur post la jaro 1927. D-ro Stefančić estis unu el tiuj, kiuj revivigis la Movadon en Jugoslavio organizante la landan kongreson en Subotica en 1931. Kiel prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo, li tiutempe iniciatis la eldonadon de multobligita *Bulteno*, kiu kondukis al la fondiĝo de *La*

Suda Stelo (1932), kies kunfondinto li estis. D-ro Stefančić kunlaboris ankaŭ en *Litērafura Mondo*, *Heroldo*, *Enciklopedio de Esperanto*, estis kunfondinto de *Balkana Konkordo* (1930), iniciatis kurson pri retoriko (1933). Li verse prilaboris la verkon de I. Cankar *Servulrajto* (1933) kaj verkis poemojn, kiuj aperis en *La Suda Stelo*, *La Progreso* kaj *Jugoslavia poemaro Reeĥoj* (1961).

FRANCESCO FRESCO 1894-1974

La 23an de junio 1974, en Romo mortis prof. Francesco Fresco, ekde 1928 membro kaj de 1932 ĝis 1969 fakdelegito de UEA. Li estis tre ak-

tiva en la loka grupo en Romo, kie li, kiel LKK-ano, kunorganizis la 27an UK en la jaro 1935.

REMY VAN EYNDE 1901-1974

Fine de aprilo 1974, en Antverpeno forpasis s-ro Remy van Eynde, emerita laborinspektoro, multjara fakdelegito de UEA kaj konata aktivulo en la loka kaj landa E-organizaĵoj.

BOGIĆ NOVELJIĆ 1908-1974

En junio ĉi-jare, en Titograd (Jugoslavio), forpasis s-ro Bogić Noveljić, emerita lerneja direktoro, aktivulo en la Movado depost 1932. Li gvidis kursojn, fondis la lokan kaj regionan E-organizaĵojn kaj kunredaktis la tradukon de la fama epopeo de P.P. Njegoš *La Montara Krono* (1970).

Anoncetoj

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, Greklando aŭ Jugoslavio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj. Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002, Nederlando.

Pagantaj gastoj estas akceptataj en mia hejmo, en idilia vilaĝeto en Jutlando. Infanoj bonvenaj. Petu informojn: Tove Madsen, Sølbyvej 40, DK-8354 Hov, Danlando.

27-jara pola instruisto pri arto volas korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo: Edward Weremko, Królewska 11 pzw, PL - 20-109 Lublin, Pollando.

Kiu tralernis PLENAN GRAMATIKON (3a eldono en tri kajeroj 1958-1964) tiel bone, ke li povas vendi sian ekzempleron al mi? Ofertojn bonvolu sendi al Hans Jürgen Feilke, D-2800 Bremen 41, Bottroper Str. 40, Germanujo.

FILMSCENARIO! Kiu tradukus ĝin anglen? Kiu persone kontaktas kun filmproduktistoj? Skribu al Jan Fethke-Forge, Liberdastr. 11, West-Berlin 44.

Dekjara knabino ŝatus korespondi per poŝtkartoj kun la tuta mondo. Skribu je la adreso: Dana Šimková, Esperanto-rondeto, ZDŠ - Lindnerova str., Praha 8, Libeň, Ĉeĥoslovakio.

Fraŭlino, 26-jara bulgara akuŝistino, deziras edziniĝi al fraŭla samideano, serioza, de bonstata profesio. El ĉiuj partoj de la mondo, de kie ajn, skribu al f-ino Jordanka

Janeva Nikolova, str. Neofit Bozveli no. 18-et. 2 (Antovi), Kjustendil, Bulgario.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO estas la titolo de nova kaj plaĉe prezentita legolibro por ridemaj lernantoj kaj instruantoj. Ĝi enhavas 2000 konversaciajn frazojn, parol-turnojn, didaktikajn demandojn kaj respondojn, kaj 20 tutpaĝajn humurajn ilustraĵojn. Prezo: 4,50 guldenoj (por Nederlando: 4,68 gld.); sendo-kostoj: 10%. Mendu ĉe via-landa libro-servo aŭ rekte ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002. Poŝta ĉek-konto: 37 89 64.



Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 København, daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Skribu al Radio Budapeŝto, Budapest, Hungario petante pri disaŭdigoj en Esperanto. Amasa skribado donos rezultojn.

Librojn kaj broŝurojn elĉerpitajn proponas al vi je favoraj prezoj, el sia kolekto de duoblaĵoj, la Biblioteko Hodler de UEA. Petu liston kaj kondiĉojn ĉe: Biblioteko Hodler, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Filatelistoj! UEA povas liveri al vi kolekton de poŝtmarkoj de preskaŭ ĉiu ajn lando aŭ temo je du trionoj de la efektiva kataloga prezo. Minimuma mendosumo: 10 guldenoj. Sendu vian mendon, prefere kun samtempa pago, al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.



VERKO, KIUN DEVUS STUDI ĈIU AKTIVA MEMBRO:

POR PLI EFIKA INFORMADO

artikolserio de Ivo Lapenna unue publikigita en la revuo *Esperanto*, eldonita de la Informa Fakto de UEA kiel 20-paĝa bele ilustrita broŝuro plenŝtopita per praktikaj konsiloj ĉerpitaj el la multjaraj spertoj de la aŭtoro sur la kampo de informado.

Prezo: 2,25 (por Nederlando 2,34) guldenoj, plus sendokostoj 10%. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Rabato por kvantaj mendoj.

La legolibro, kiun ni plej bezonis

Verkita en simpla stilo por faciligi al novaj lernantoj paroli la Internacian Lingvon

141 pj.
Poŝformata (22 x 12 cm)

Novspeca legolibro enhavanta 20 dialogojn kun 2000 konversaciaj frazoj, parolturnoj, demandoj kaj respondoj kaj kun 20 tutpaĝaj humuraj ilustraĵoj. La tekstoj estas laŭgrade aranĝitaj.



Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris: Arfoll. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

ZAMENHOF NE PRETENDIS FARI NELOGIKAN, NEREGULAN LINGVON

Legu "Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto", de L. Mimó.
Prezo 17,50 guldenoj.

Ĉu vi parolas tendare?



2a eldono
broŝurita
ilustrita
96 paĝoj
21x15cm

de Renato Corsetti kaj Mauro La Torre.
Rektametoda lernolibro de TEJO por kursoj en labortendaroj. Prezo: 2,50 (por Nederlando 2,60) gld. plus sendokostoj 10%.
Rabato por kvantaj mendoj: 1/3 ekde 3 ekz.

Anonco en esperanto

atingas pli da legantoj en pli da landoj, ol anonco en iu ajn alia Esperanta revuo.

Tarifo:

anonco tutpaĝa = 375,— gld.
anonco duonpaĝa = 200,— gld.
anonco kvaronpaĝa = 110,— gld.
anonco okonpaĝa = 65,— gld.
anonco deksekonpaĝa = 40,— gld.
Rabato por sensanĝa ripeto: 20%.


Dek mil libroj disponeblaj!

Dank' al la instalo de moderna kserografia kopiilo en la Domo de UEA en Rotterdam, la tuta riĉaĵo de la Biblioteko Hodler, kun multaj miloj da libroj kaj gazetkolektoj, estas nun atingebla je moderaĵoj por ĉiuj membroj ĉie ajn en la mondo. Jen nur kelkaj ekzemploj de jam pretaj kaj tuj livereblaj fotokopioj. La Fotokopia Servo de UEA volonte plenumas viajn mendojn pri tiuj aŭ iu ajn alia volumo el sia kolekto. Petu oferton pri specifa verko aŭ petu kompletan liston de la jam pretaj kopioj!

<i>Kiel plaĉas al vi</i> (Shakespeare) 137p. Ilustr.	21,70
<i>Statistiko de 50 000 tekstvortoj</i> (Blaas) 1950	12,50
<i>La langue internationale</i> (Zamenhof) 1887	9,20
<i>Bhagavad-Gîtâ</i> (tr. Lorenz) 1942 95p.	16,40
<i>Filozofia vortaro</i> (Kamaryt) 1934. 170p.	14,75
<i>Juristisches Wörterbuch Deutsch-Esp.</i> 86p.	8,60
<i>Oduseias de Homeros</i> (tr. Manders) 306p.	48,20
<i>La ringo de la generalo</i> (Lagerlöf) 127p. 1938	11,60
<i>La venecia komercisto</i> (Shakespeare) 101p.	10,10
<i>Dekdu poetoj</i> (red. Kalocsay) 126p. 1934	11,60
<i>Infero</i> (Dante/Kalocsay) Ilus. ĉ.300p. 1933	49,40
<i>Plena gramatiko vol. 2</i> Eldono 1964. 178p.	29,60
<i>Sinjoro Tadeo</i> (Mickiewicz/Grabowski) 334p.	30,—
<i>Robinsono Kruso</i> (Defoe) 143p. 1908.	12,80

Ĉiu kompleta kopio estas liverata en plaĉa plasta bindaĵo. Prezoj estas en guldenoj. Aldoniĝas 10% por sendokostoj kaj, por Nederlando, 4% imposto.

internacia lingvo



NUN ANKAŬ EN LA FORMATO A3!
La konata internacia afiŝo de UEA, kvarkolora desegnaĵo de Tadeusz Moskala, aperis nun ankaŭ en la oportuna norma formato A3 (420x297 mm), kaj kostas nur 0,25 gld. (por Nederlando 0,29), plus sendokostoj 10%. Minimuma mendo: 10 ekzempleroj. Libroservo de UEA.

universala esperanto-asocio - nl:univ. blonaweg 176 - rotterdam 3082 - nederlando

Pro
5
gld.

ATENTON, PAGONTOJ!

Ekde la 1-a de julio 1974 la bankoj en Nederlando denove plialtigis la sumon, kiun ili subtrahas ĉe diversspecaj internaciaj transpagoj kiel kompenson pro sia perado. Nun validas por tiuj bankkostoj minimuma sumo de 5,— guldenoj! Tio signifas, ke iu, kiu el alia lando deziras havigi al UEA ekzemple 20 gld., devas, se li pagas per banko aŭ banka ĉeko, elspezi minimume 25 guldenojn!

Pro tiuj altaj kostoj ni forte rekomendas al ĉiuj membroj, kiuj rekte pagas al UEA, fari tion prefere pere de la internacia poŝta ĝirsistemo aŭ, se tio ne ekzistas en la koncerna lando, pere de internacia poŝtmandato. En tiuj kazoj la kostoj estas multe pli malaltaj. Alia ebleco, almenaŭ por la membroj en Britio, Francio, Svedio kaj Svislando, estas pago al la specialaj kontoj de UEA en tiuj landoj. (Detaloj en la Jarlibro.)

Se tamen nepre necesas pagi per banko aŭ banka ĉeko, tiam ni rekomendas sendi en unu fojo pli grandan sumon, ĉar la minimuma subtraho de kostoj validas por ĉiu unuopa ĉeko aŭ pago. La kostoj por ekzemple du ĉekoj po 15 dolaroj estas almenaŭ duoble pli altaj, ol por unu ĉeko de 30 dolaroj.